Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 21 — Trimonata

2/91

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktisto: ERTL István

Teknikaj redaktistoj: Stefan MacGILL

KOVÁCS Márta

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Esperanto-fako, Universitato ELTE/BTK
H-1364 Budapest, Pf. 107
☎ + 36-1-1180-966/185

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

Enhavo

WAHA, Blazio, Disĉiple kaj memstare, Intervjuo kun KOUTNY Ilona 1
Studplanoj de la universitato ELTE (tagaj, korespondaj, internaciaj kursoj) . 7
v.d. HORST-KOLINSKA, Mila, Ĉu eblas produkti vid-bendan kurson? 10
BRACSAY, Zsuzsa, 9-a Internacia Metodika Seminario. 11
STROBL, Katalin, Komunika Esperanta Lernolibro (disertacio daŭrigota). 14
KOVACS, Marta, Pri la sekcioj de ILEI en 1990 (konferenca dokumento) . 22
MALOVEC, Miroslav, Deklaracio de rajtoj de Eŭropa lernejano 24
Konkludoj pri la sekciaj raportoj kaj ceteraj sekciaj novaĵoj 25
TANGERUD, Odd, Po – distriba prepozicio 27
KLAG, Walter, Recenzetoj (Tiu toskana septembro, Fazodiagramoj) 28
Ni esploru la mondon (nova libreto el San Diego) 29
MacGILL, Stefan, Manifesto sub lupeo (konferenca temo) 30
Noticoj el la granda mondo 35
ANDREASSON, Bertil, Financa raporto de ILEI por 1990..... 36
ANDREASSON, Bertil, Evoluo de la membraro de ILEI 1984 - 1990 38
(Tiuj estas anbaŭ konferencaj labordokumentoj)
ZSUZSA Barcsay, Plurlingvismo, najbara dulingvismo kiel idealo kaj realo. 39

En ĉi tiu numero de IPR ni aperigas tri labordokumentojn por trakto en nia konferenco: la financan jarraporton, la plurjaran membrostatistikon kaj la raportojn de la sekcioj. Krome aperas la lasta el serio de preparaj artikoloj pri la konferenca temo. Bovolu kunporti ĉi tiun numeron al la konferenco se vi ricevos ĝin ĝustatempe por tio.

Ankaŭ la numeroj 4/90 kaj 1/91 portis pritemajn artikolojn kaj 1/91 enhavas la diskutotan tekston de la nova statut-propono. Bonvolu kunporti ankaŭ tiujn numerojn se eble. Ĝis revido en Voss!

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto : Edward Symoens, Putsesteenweg 131/A, B-2920 Kalmthout; telefono (03) 666.62.66 — Kunordigado, informado en pedagogiaj medioj, rilatoj kun Unesko kaj UEA.

Vicprezidanto : Stefan MacGill, Esö 7.III, H-1034 Budapest — Tel. 206216 (laboreje) Internaciaj ekzamenoj kaj iliaj kursoj, statistikado de instruado, internaciaj lerniloj, lerneja projekto, IPR.

Ĝen. Sekretario : *Vakas — provizore la vicsekretario traktas la laboron.*

Kasisto : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby; tel. (0415)-501 52 — Financaj rilatoj kun sekcioj, konferenco, k.a.

Disĉiple kaj memstare

Intervjuo kun Ilona Koutny
okaze de la 25-jara jubileo de la Esperanto-fako
de la Budapeŝta Eötvös Universitato

La E-fako de Eötvös Universitato jubileas en la studjaro 1990/91. Ĝin fondis prof. István Szerdahelyi en 1966 kaj gvidis ĝis sia morto en 1987. Dank' al lia scienca laboremo kaj sugestiva personeco pli ol cent gestudentoj finis siajn studojn pri esperantologio, inter ili pluraj eksterlandanoj. La fako ankaŭ nun prosperas malgraŭ la malfacilaj kondiĉoj. La laboron daŭrigas liaj du posteuloj d-inoj Ilona Koutny kaj Zsuzsa Varga-Haszonits. La unuan intervjuis d-ro Balázs Wacha pri la fako kaj ŝi mem.

BW: Ilona Koutny – la nomo estas jam delonge konata en esperantistaj medioj. Ŝi estis redaktisto de Scienca Eldona Centro kun András Lukács; kompilis la gravan artikolaron Perkomputila Tekstoprilaboro, kunredaktis la iaman Internacian komputadon kun d-ro Péter Broczkó. Ŝi daŭre okupiĝas pri komputolingvistiko. Lastatempe ŝia nomo ligiĝas al komputila parolgenera sistemo ESPAROL kaj al la parolantaj instruprogramoj. Samtempe ŝi instruas Esperanton kaj lingvistikon en la Budapeŝta Eötvös Universitato. Ŝi studis matematikon, francan filologion, Esperantologion, poste ankaŭ ĝeneralan lingvistikon, parolas france, germane angle je sufiĉa nivelo por partopreni en internaciaj konferencoj, kunlaboroj. Ŝi estas celkonscia, entreprenema, obstina, iom gvidema. Ŝi kapablas atenti cent aferojn samtempe. Kelkfoje ŝi ŝajnas al mi tro memdecidema, sed la fruktoj de ŝia laboro plejparte pravigas ŝin. Ilona, ĉu vi volas iel modifi mian ĝeneralan karakterizon pri vi?

IK: La faktoj pravas pri studoj, lingvoj, entreprenoj kaj celkonscio. Min interesas multaj aferoj, mi ekokupiĝas pri ili, sed mi ne sukcesas ĉion ellabori sufiĉe profunde, kiel mi ŝatus kaj ĉefe ne ĝustatempe, ja mi tamen ne kapablas plenumi samtempe cent aferojn.

Mia esplortereno estas komputolingvistiko krom esperantologio, kaj mia profesio la instruado. Ekde miaj studentaj jaroj mi instruas ion, ie, iel. Mi ŝatus transdoni miajn entuziasmon kaj scivolemon por la indaj diversajoj de la vivo tra la studata materialo, sed mi ankaŭ postulas ion. Por tio necesas klara plano kaj – kiel unu el miaj studentoj vortigis – milda perforto.

Eble ŝajnas, ke mi estas decidema, ĉar se mi volas atingi ion mi fine devas decidi por povi ekagi, sed interne mi havas miajn dubojn kaj batalojn... Gvidemon mi ne vere havas, mi preferas kunlabori en grupo bone interkompreniĝanta kaj diskutanta la problemojn, sed manke de gvidanto mi kelkfoje

surprenas la nedankindan rolon de gvidanto kaj... ankaŭ tiun de plenumanto, ĉar senfinaj diskutoj aŭ neglekto de la aferoj nur malhelpas la agadon.

BW: Mi taksas via speciala virto la kapablon kunlabori kun multaj diversuloj. Vi glate kunlaboras kun viaj kolegoj: d-rino Zsuzsa Varga-Haszonits, lekcianta pri interlingvistiko kaj E-a literaturo kaj d-rino Katalin Horváth, kiu tre energie kaj konscience laboras pri ĝenerala lingvistiko ankaŭ por la studentoj de E-fako. Vi sukcese igis prelegi ĉe la universitato de tempo al tempo bonegajn fakulojn kiel d-ron Klaus Schubert, klarvidan kaj produkteman lingviston ĉe la DLT-projekto, Giorgio Silfer, multmeritan literaturiston, eminentan poeton kaj porkulturan aganton aŭ prof. Michel Duc Goninaz, elstaran lingviston; vi sukcesis sendi kelkajn gestudentojn staĝi ĉe Kultura Centro Esperantista en Svislando. Krome vi kunlaboras kun Zsuzsa Barcsay, Imre Szabó, d-ro Árpád Rátkai kaj mi — ĉiuj el ni pli-malpli regule instruas ion en la E-fako. Eble iujn mi ne menciis. Ĉu estas simple kunlabori kun tiom da homoj?

IK: Al la vico de kunlaborantoj aliĝas la talenta literaturisto István Ertl, la redaktoro de IPR kaj Katalin Stróbl, ambaŭ antaŭ nelonge ankoraŭ miaj gestudentoj kaj nun lekciistoj. Ni kunlaboras kun la Hungara Esperanto-Asocio, kiu helpas nin per modesta subvencio kaj siaj eldonaĵoj. Ni kontribuas al ilia superagradaj kursoj kaj mi gvidas ĝian ekzamenkomisionon. Ankaŭ kun la Akademio Internacia de la Sciencoj ni havas bonajn rilatojn, kiel ĝia a.docento mi kelkfoje prelegas dum sesioj, same ĉe IKU dum UK. Ankoraŭ eblus daŭrigi la labor-rilatojn enlande kaj eksterlande.

Mi opinias, ke nuntempe kunlabori necese estas kaj des pli tio validas por E-o. Por havi multflankajn E-fakon kaj ankaŭ E-movadon ni devas disdividi la laboron, ja tiu abundas kaj tiel ĉiuj povas alporti siajn kompetenton kaj personecon. Sen internaciaj kontaktoj E-o perdas sian sencon. Kompreneble estas malfacile eviti konfliktojn ĉe homaj rilatoj. Mi estas sufiĉe rekta homo, mi diras mian opinion, eĉ se tio povas esti malagrabla por la alia, se por solvi la problemon, tio necesas. Mi preferas rektan alfrontigon de opinioj kaj sentoj por malkaŝi la verajn problemojn kaj solvi ilin kune ol lasi en la homoj sekretajn ofendojn, miskomprenojn, kio ofte okazas ankaŭ en nia movado.

Al KCE ligas min gravaj kaj belaj travivaĵoj el mia studenta tempo, kiam mi mem staĝis tie kaj spertis la specialan etoson de Esperantujo. Dum la pasintaj 3 jaroj eblis havigi similajn travivaĵojn al kelkaj de miaj gestudentoj. Mi tre deziras, ke la nuna kriza stato de KCE forpasu kaj ili denove povu akcepti gestudentojn. Mi konsideras tiujn spertojn tre gravaj, ĉar alie E-o povas perdi sian efikon kiel aliaj universitataj studoj.

BW: Kia estas la situacio de E-fako en la unversitato?

IK: Nuntempe Esperanto-fako estas organize parto de la Katedro pri Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko kaj apartenas al la suplementaj fakoj (kiel skandinavistiko aŭ estetiko), tio signifas, ke en la dua jaro de siaj studoj la gestudentoj povas viziti la enkondukajn lecionojn kaj ekde la tria jaro studi esperantologion kiel fakon. Inter la studobjektoj figuras krom lingvoinstruado, ankaŭ enkonduko en esperantan kulturon, esperanta literaturo, priskriba gramatiko, aplikata lingvistiko, metodiko, interlingvistiko kaj movadhistorio. Fine de la kvina jaro, post la ŝtata ekzameno la gestudentoj ricevas diplomon.

Krom la tagaj studoj ekzistas ankaŭ postdiplomaj studoj pri esperantologio por tiuj, kiuj jam scias la lingvon. Tio daŭras tri jarojn (ĉiumonate 3 tagojn) kaj entenas krom la menciitaj studobjektoj ankaŭ branĉojn de ĝenerala kaj aplikata lingvistiko.

BW: Kiel povas eksterlandanoj aliĝi al la kursoj?

IK: Havante jam bazajn universitatajn studojn kaj akirinte stipendion en sia lando aŭ mem paginte la kotizon ili rajtas aliĝi al la tagaj kursoj. Ili povas



La intervjuito, Koutny Ilona, inter siaj gestudentoj kaj nederlanda gasto en la instruejo kaj laborejo de la Esperanto-fako.

kunigi po 2 jaroj kaj tiel dum 2 jaroj diplomiĝi pri E-o. Eble ankaŭ E-aj fondaĵoj povus helpi al studemuloj el la tria mondo.

Kun ĝojo mi povas anonci, ke en tiu ĉi studjaro ekfunkciis ankaŭ la internacia koresponda interlingvistika fako trijara, kiu samtempe plilarĝigas la kadron de interlingvistiko kaj ebligas specialiĝon pri diversaj terenoj de esperantologio (lingvistiko, literaturo, metodiko, ĵurnalismo, komputa lingvistiko). La fina diplomo estos magistra aŭ doktora depende de la antaŭa grado de la studento kaj de la disertaĵo. Je nia granda surprizo aliĝis pluraj konataj esperantistoj al la studoj. Tio kontribuas al la pli vastaj internaciaj rilatoj de la fako kaj la altnivela scienca laboro enkadre de nia esperantologia metiejo.

BW: En la E-fako, precipe ĉe la postdiplomaj studoj oni instruas relative multe da teoriaj studobjektoj kaj ĝenerala lingvistiko. Sed la estontaj instruistoj bezonus antaŭ ĉio alproprigi kapablojn praktike uzi E-on: paroli kaj instrui

bone. Mi scias, ke vi kaj Zs. Barcsay faras multe ankaŭ por tiu ĉi celo, tamen la ekvilibro ne ŝajnas esti perfekta. Kiel vi vidas tion?

IK: Vi pravas, ke necesas elformi bonan lingvoscion ĉe la gestudentoj, sed nur dum la lecionoj tio ne eblas; nepras, ke ili ekuzu la lingvon, kiel cetere estas la kazo ĉe iu ajn lingvo. Ankaŭ la teoriaj studobjektoj necesas – laŭ mi –, ja fakulo kun universitata diplomo ne povas kontentiĝi nur pri la scio de la lingvo, tiu devas havi pli vastan superrigardon pri sia tereno. Multaj esperantistoj interesiĝas kaj parolas pri lingvistikaj problemoj en E-o, eĉ ili provas pluevoluigi ĝin sen kompreni la bazan funkciadon kaj leĝojn de lingvo. Por kompari E-on, tiun funkciantan interlingvistikan modelon, kun aliaj etnaj lingvoj kaj kompreni la apartecon de E-o estas bone koni iomete ĝeneralan lingvistikon.

BW: Same, kiel mi, ankaŭ vi havis la bonŝancon studi ĉe prof. Szerdahelyi. Li estis vera pedagogo, kies revo estis fari sin superflua: starigi posteulojn, kiuj alproprigas kaj kreskigas en si ne nur la konojn, kapablojn, sed ankaŭ la amon kaj respondecon al la afero. Kio estas lia spirita heredaĵo por vi, kion vi trovas plej sekvinda en lia laboro?

IK: Ni, gestudentoj, ĉiuj ŝatis lin; mia generacio nomis lin paĉjo inter si, ĉar li zorgis pri ni, ekzemple li trovis vojaĝeblojn aŭ interesajn studtemojn, do li kaptis iel ĉiujn. Ni ŝatis liajn studhorojn, ĉar li interese prezentis la fakajn sciojn, li ĉiam havis personajn rimarkojn, rilatajn anekdotojn. Malantaŭ tiu ĉi agrabla bildo li havis siajn luktojn por rekonigi la fakon en la universitato, inter ofte mokemaj aŭ ignoraj lingvistoj kaj pedagogoj, kaj bedaŭrinde, ankaŭ en la movado, pri kiuj ni tiam ne vere konsciis. Mi scias, ke kelkaj opinias, ke Esperantujo ne bezonas universitatajn diplomitojn, nur movadulojn...

Prof. Szerdahelyi pruvis, ke eblas science okupiĝi pri E-o kaj planlingvoj, tiel li kontribuis al la rekonigo de interlingvistiko kiel lingvistika branĉo. Liaj studoj pri interlingvistiko, esperanta gramatiko kaj metodiko apartenas al nia komuna trezoro. Laŭ mi, E-o jam elkreskis el sia infanaĝo kaj tendencas al vivanta socio, kie kaj movaduloj kaj sciencistoj devas havi sian lokon.

Lia homa kaj sciencista personeco estas modela por mi, kvankam min allogas ne la pasintecema filologio, sed la futurema komputiko.

BW: Kiagrade eblas esplorado en la fako kaj ĉu vi havas eblon eldoni esperantologiajn verkojn?

IK: Nur duope ni estas dungitaj instruistoj de la fako, tiel ni havas sufiĉe grandan ŝarĝon: instruadon, administradon kaj kompreneble esploradon. Mia kolegino Zsuzsa Varga-Haszonits okupiĝas pri la instruado kaj esplorado de interlingvistiko kaj literaturo. Mia kampo estas E-a lingvistiko kune kun aplikataj terenoj kaj lingvoinstruado. Ekzemple tre utila estis la kunlaboro kun la nederlanda maŝintraduka projekto DLT. Ni ellaboris modelon de hungara dependogramatiko kaj komparan sintakson inter la hungara kaj E-o, en kio partoprenis ankaŭ gestudentoj. De tempo al tempo mi testas miajn

instruprogramojn en la instruado. Kompreneble tio irus pli glate, se ni havus propran komputilon!

Nu, ankaŭ studentoj verkas sian diplomlaboraĵon ofte el E-o, jam ekzistas almenaŭ 70 ampleksaj studoj (vd. ankaŭ raporton en IPR 1990/4) kaj kelkaj eĉ doktoriĝis. Ekzemple duopo nun enketas pri la hungara E-movado.

La necesajn universitatajn lernolibrojn parte prof. Szerdahelyi verkis (lernolibron, interlingvistikon, metodikon kaj literaturajn krestomatiojn), parte ili estas ankoraŭ verkendaj. Necesus ekzemple studlibro pri gramatiko, ja PAG malmodernas kaj maladekvatas al la specifecoj de E-o kaj la elstara Lingvistikaj aspektoj de Wells ne sufiĉas. Ankaŭ vi, Balázs, kontribuos al tiu projekto, ĉu ne?

BW: Elformiĝis kelkaj interlingvistikaj centroj: en la iama GDR gvidate de d-ro Detlev Blanke, en Pollando kun la gvido de Ryszard Rokicki, en Ĉeĥoslovakio kun d-ro Stanislav Kośecky kaj aliaj. Ili regule organizas konferencojn. Ĉu ni sekvu ilian modelon aŭ anstataŭ dissplitigi niajn fortojn ni kunigu ilin?

IK: Tre gravas konferencoj, kie samfakuloj povas spertinterŝanĝi, sed tre gravas ankaŭ la konstanta laboro, kies eblecoj estas donitaj nur ĉe ni. Mi alte taksas la persistan laboron de Rokicki por organizi 16 SIS-ojn (kiu en lia kaj mia studenta epoko estis la mallongigo de Studenta Interlingvistika Seminario, kaj elkreskis al Scienca Interlingvistika Simpozio) kaj tiun de D-ro Blanke por la famaj seminarioj en Bad Saarow. Ŝajne la ŝanĝoj en Eŭropo malfavoras tiujn kunvenojn. Eble ni ĉiuj kune tamen sukcesos organizi interlingvistikan seminarion en 1992 en Poprad.

BW: Ĉu E-fako kunlaboras kun aliaj superaj lernejoj?

IK: Laŭ la eblecoj, jes. Ni ricevas informojn pri la E-instruado el la Universitato de Debrecen, el la Pedagogia Altlernejo en Eger, kaj pli intense kunlaboras kun la Pedagogia Altlernejo en Szombathely, kie en tiu ĉi studjaro fondiĝis E-fako dank' al la senlaca entuziasma laboro de s-ino Katalin Smidéliusz. Ni serĉas kunlaborrilatojn kun alilandaj superaj lernejoj. Estus bone efektivigi interŝanĝojn de studentoj... Sed ni havas praktikajn kontaktojn nur kun la Universitato de Aix-en-Provence (Francio). En la pasinta jaro okazis seminario pri la universitata instruado de E-o (vd. IPR 1990/4) kaj estas fondiĝanta organizaĵo por universitataj e-instruistoj, eble tio iom helpos por la praktika kunlaboro.

BW: Kiun perspektivon vi vidas por E-fako?

IK: En nia universitato okazas nun grandaj ŝanĝoj, oni celas adopti la okcidentan sistemon; oni favoras la studadon de nur unu fako kun aldonaĵoj aŭ malĉefaj fakoj. Eble E-o havos pli da eblecoj en tiu kadro (ni ĵus ellaboris pli vastan programon), eble ĝi devas resti malĉefa fako. Ni ne povas atendi grandajn amasojn, ĉar la postdiplomaj realaj laboreblecoj pri E-o estas malmultaj, kvankam ekde la studjaro 1989/90 E-o estas elektebla principe eĉ kiel la unua fremda lingvo en ĉiuj lernejotipoj de Hungario. Tamen por praktike realigi

tion oni devas batali kontraŭ la direktoroj kaj por la interesiĝo de la gelernantoj kaj gepatroj. Mi esperas ankaŭ pri internaciaj kontaktoj, ja tamen nia universitato eldonas la plej altnivelan E-diplomon, kion Esperantujo devus eluzi.

BW: Mi kompatas vin pro tiu ĉi intervjuo, ĉar mi scias, ke vi havas diversajn samtempajn laborojn ĝis super viaj oreloj, sen miaj demandoj. Prof. Szerdahelyi, mortinta tro frue, lasis al vi amason da laboro, ekzemple la Hungaran-Esperantan mezan vortaron; vi partoprenadas internaciajn konferencojn, ktp. Kio nun plej okupas vin? Kiel viaj tempo kaj forto povas sufiĉi?

IK: Vi menciis la vortaron, kiu jam de pluraj jaroj pretiĝas helpe de multaj kunlaborantoj el diversaj fakoj, inter ili ankaŭ vi. Tio estas ambicia projekto kun ĉ. 50.000 kapvortoj kaj la laboro de radaktanto tre malfacilas. Nun estas tempo por fini ĝin, ĉi somere mi streĉe laboros pri ĝi.

La alia tasko, en kiu mi volas multe progresi somere, estas la parolanta instruprogram-pakaĵo PAROLERN, kiun mi prezentos dum la internacia konferenco pri komputila lingvoinstruado EUROCALL en Helsinki finaŭguste. Mi volas kunmeti ankaŭ materialon de komenca Esperanto-kurso por la instruprogramoj. Tiu ĉi materialo kongruas kun mia instrumaterialo por komencantoj en la universitato, kiun mi baldaŭ devus libroforme pretigi...

Do taskoj abundas, kaj mi devas havi sufiĉe da energio por plenumi ilin! Tamen mi ŝtelas tempon por ripozi dum miaj eksterlandaj vojaĝoj: en aprilo mi vizitis la universitaton de Aix-en-Provence kaj post la konferenco en Helsinki mi gvidos du kursojn en Francio: en la Alpoj kaj ĉe la Mediteranea maro, do mi esperas iom migri, kion mi ŝategas kaj iom bani min.

BW: Ni deziras forton por la realigo de viaj planoj kaj dankon por la intervjuo.

Nia prezidanto honorata

Fine de majo la Esperanto-grupo 'La erikejo' en Kalmthout (orienta Flandrio) festis sian dudek-jaran ekziston. Festaj eventoj estis organizitaj tra tuta tago por kvardeko da Esperantistoj el la tuta regiono. La ĉefa punkto estis akcepto en la urbodomo de Kalmthout flanke de la urbestro. Samtempe kun la kluba festado, la evento honorigis la vivlongan aktivecon de nia prezidanto, s-ro Edward Symoens, por la Esperanto-movado, kaj en Eŭropo kaj en Afriko.

La evento estis abunde raportita en du ĉefaj flandraj gazetoj: En *Het Volk* aperis trionpaĝa artikolo, en *Gazet van Antwerpen* duonpaĝa, ambaŭ kun trafaj grandaj fotoj. Okaze de la solenaĵoj, pluraj esperantistoj havis okazon paroli pri la evoluo de la loka kaj internacia movadoj kaj iliaj vortoj estis bone raportitaj.

Studplanoj validaj en 1990/91

Instruplano de la Esperanto-fako en Eötvös universitato: taga studado

Studobjektoj	horoj/semajne	semestro	devigo
Enkonduko			
Enkonduko en E-on	2+2 s	3a,4a	3:pr.n, 4:baza e
(Tiu, kiu scias E-e, devas plenumi nur la bazan ekzamenon)			
Enk. en ĝeneralan lingv. (prop. hungarlingva p)	1 p	3a, gis 6a	e
Ĉefstudoj			
E-a lingvoekzerco I	4+3 s	5a,6a	pr.n
E-a kulturo	2 s	5a	pr.n
Aplikata lingvistiko	2 s	6a	pr.n
E-a literaturo	1+1+1 p	6a,7a,8a	e, 8:rig.e
	2+2+2 s	6a,7a,8a	pr.n
E-a lingvoekzerco II	2+2 s	7a,8a	pr.n
E-a priskriba gramatiko	1+1 p	7a,8a	e, 8:rig.e
	1+1 s	7a,8a	pr.n
Historio de E-a movado	1+1 p	ĝis 10a	fine: e
Interlingvistiko	1+1 p	9a,10a	e
	1+1 s	9a,10a	pr.n
Metodiko	2+2 s	9a,10a	pr.n

Ŝtata ekzameno (fine de la 10a semestro) kaj defendo de faklaboraĵo

Laŭ la proponataj:

semestro:	3a	4a	5a	6a	7a	8a	9a	10a
horoj semajne:	2	3	6	8	8	8	4	4

Mallongigoj:

e:	ekzameno	rig.e:	rigora ekzameno	pr.n:	praktika noto
p:	prelegoj	s:	seminarioj	enk:	enkonduko
H:	hungare				

Instruplano de Esperanto-fako en Eötvös universitato: enlanda koresponda/suplementa studado (por diplomitoj)

Studobjektoj	horoj/monate	semestro	devigo
Enk. en ĝeneralan lingv. H	5+5 p	1a,2a	e
Enk. en esperantologion	4 p	1a	e
E-a lingvoekzerco	5+5 s	1a,2a	pr.n
Sintakso H	4+4 p	1a,2a	e
Fonetiko H	4 p	1a	e
Fonologio H	4 p	2a	e
E-a literaturo	2+3+3 p	2a,3a,4a	e, 4:rig.e
	2+3+3 s	2a,3a,4a	pr.n
E-a priskriba gramatiko	4+4 p	3a,4a	e, 4:rig.e
	3+3 s	3a,4a	pr.n
Semantiko H	3+3 p	3a,4a	e
Socilingvistiko H	2 p	3a	e
Lingvotipologio H	2 p	3a	e
Komputikaj konoj	2 s	4a	pr.n
Lingvoj de la mondo H	2 p	4a	e
Lingvofilozofio H	2 p	4a	e
Komputa lingvistiko	2 p	5a	e
Interlingvistiko	2+2 p	5a,6a	e, 6:ŝtata e
	4+4 s	5a,6a	pr. n
Historio de E-a movado	2+2 p	5a,6a	e, 6:ŝtata e
Metodiko	2+2 p	5a,6a	e, 6:ŝtata e
	4+4 s	5a,6a	pr.n
Aplikata lingvistiko	2+2 p	5a,6a	e, 6:ŝtata e
Teorio de lingva priskribo	2 p	6a	
Ĝenerala lingvistiko			6:ŝtata e
Aktualaj problemoj de pedagogio	2 p	5a	e

semestro:	1a	2a	3a	4a	5a	6a
horoj monate:	22	22	20	22	20	18

INTERNACIA KORESPONDA INTERLINGVISTIKA FAKO

La trijara postdiploma formado intencas doni ĝeneral- kaj aplikat-lingvistikajn bazojn por la studado de internacia lingva komunikado kaj okupiĝas pri diversaj aspektoj de Esperanto, kiel funkcianta interlingvistika modelo.

La bazaj studobjektoj de la instruado koncentriĝas en la unuaj du jaroj, en la tria jaro eblas elekti el la anoncitaj specialiĝoj. Fine de la 4-a semestro metendas kompleksa ekzameno el la bazaj esperantologiaj studobjektoj, fine de la 6-a semestro okazas kompleksa ekzameno pri la elektita specialiĝo kaj defendo de la diplomlaboraĵo.

Per la plenumo de ĉi tiuj ekzamenoj akireblas la magistra titolo. Se iu, havante jam la magistran titolon, pretigas pli ampleksan kaj profundan disertaĵon, tiu povas akiri la doktoran titolon. Por la pretigo kaj defendo de disertaĵo eblas peti prokraston. Kaze de doktoriĝo pagendas precizigota kotizo. (La regularo pri doktoriĝo estas nun modifata en nia universitato.)

STUDPLANO

Unua jaro: 1-a semestro	*2-a semestro*
Enkonduko en esperantologion	Morfologio kaj sintakso
Fonetiko kaj fonologio	Esperanta literaturo II
Enkonduko en E-an kulturon	E-a priskriba gramatiko I
Esperanta literaturo I	Historio de Esperanto-movado
Lingvoperfektigo en E-o I	Lingvoperfektigo en E-o II
Dua jaro: 1-a semestro	*2-a semestro*
Semantiko kaj leksikologio	Aplikata lingvistiko I
Esperanta literaturo III	Internacia komunikado
E-a priskriba gramatiko II	E-a priskriba gramatiko III
Interlingvistiko I	Interlingvistiko II
Tria jaro: 1-a semestro	*2-a semestro*
Aplikata lingvistiko II	
Aktualaj problemoj de Esperanto	

SPECIALIĜOJ: Esperanta lingvistiko, Esperanta literaturo, Lingvopedagogio (por instruistoj), Ĵurnalistiko kaj redaktado de eldonaĵoj, Komputa lingvistiko.

La studoj komenciĝis la unuan fojon en septembro 1990. La sekva kurso komenciĝos post la fino de la unua, t.e. en septembro 1993. Postulo: bona scio de E-o kaj bazaj universitataj studoj.

Interesitoj bonvolu peti aliĝformularon ĉe: Esperanto-fako de Eötvös Universitato, Budapest, Pf. 107. H-1364 (Koncerne stipendiojn turnu vin al fondaĵoj kiel Carson, Szerdahelyi, Azio kaj Afriko).

Ĉu la Esperanto-movado kapablus produkti vid-bend-serion kun kurso por komencantoj uzeblan internaci-skale?

Tiun demandon starigas al la Movado aktiva grupo de internaciaj E instruistoj. Temas pri du proponoj:

1) produkti vidbendan serion de 24 lecionoj po 20 min. por uzo de televidaj stacioj surbaze de instrumaterialo Kurso de Esperanto de la fratoj Sekelj. (kosto 80 mil dolaroj)

2) produkti 3-horan vid-bendon kun 12 lecionoj po 15 minutoj por uzo de memlernantoj surbaze de lernolibro Esperanto 1 de I. Szerdahelyi aŭ alia instru-materialo, sed kun temoj internacie uzeblaj (kosto 21 mil US dolaroj)

Ambaŭ serioj estos NUR en Esperanto, do necesos havi poste nacilingvajn tradukojn. Tiujn tradukojn produktu landaj sekcioj de ILEI. La produktado okazus en Pollando sub gvido de Roman Dobrzynski, profesia filmisto kaj ĵurnalisto, kunlabore kun du instancoj, kiuj okupiĝas pri lingvo-instruado, t.e. ILEI kaj la Internacia Esperanto-Instituto en Hago.

Kelk-persona grupo okupiĝas pri tiuj proponoj ekde la UK en Havano, sed ĝis nun la reagoj ne estas kontentigaj, kvankam du kontribuaĵoj de sume 2 mil dolaroj estas anoncitaj.

Nia demando estas ĉu la Esperanto-movado pretus oferi monon por iu el tiuj du celoj? Se jes, bv. anonci sin al la adreso de IEI, Riouwstr. 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando, informante, kiom da mono vi pretas oferi kaj por kiu propono. Ankaŭ dum la UK eblas kontribui kaj informiĝi – specife en la 'Tago de la Lernejo' aŭ kadre de Cseh-aranĝoj. Reagojn kaj kunlaboron atendas la provizora sekretariino,

Mila v.d. Horst Kolinska. Den Haag, 22 majo 1991.

ILEI estas efektive ligita kun ĉi tiu aŭdaca plano, kvankam ĝia motoro estas IEI kaj tiu laborgrupo starigita. La preciza propono prezentita supre ne alvenis pli frue al la estraro de ILEI ol al la redaktoro. Ni aperigas ĝin ĉar nuntempe (kaj eble estonte) la ĉefaj kontribuoj de ILEI povos esti la informado pri la projekto kaj la faka kontribuo.

Ĉar ĝi estas finance aŭdaca (bezonanta kvaroble pli ol la tuta kapitalo de la Ligo) ILEI petos detaligon de la sumo prezentita kaj konsilos kompilon de konciza buĝeto eĉ je ĉi tiu frua stadio, kiu indiku la ĉefajn kosto-rubrikojn kaj ĉu atendeblas iuj enspezoj. Tiel niaj membroj povos pli informite rilati al la projekto. ILEI kompreneble devas havi opinion ankaŭ pri la stud-materialo sur kiu oni planas bazi la kursojn.

La nuna estraro direktos al IEI serion da demandoj kaj kelkajn konsilojn por influi kaj konkretigi la debaton en Bergen, kaj por doni gvidon al la nova estraro, kiu kompreneble spegulos kaj elformos la sintenon de la Ligo al ĝi.

smg

9-a Internacia Metodika Seminario (IMS)

okazis la 9-12-an de aprilo 1991 en urbo Odorheiu Secuiesc / Székelyudvarhely en Rumanio.

Plurajn fakajn celojn kaj taskojn havis la 9-a IMS, el inter kiuj ĝi elektis tiujn, kiujn la partoprenantaro pleje bezonis:

1). Okazis prelegserio kun praktikaj prezentoj pri metodiko, resp. lingvopedagogio de la Esperanto-inatruado. La temoj de la prelego i.a. estis:

– Efiko de lingvistikaj kaj psikologiaj tendencoj al la fremdlingvo--instruado (BARCSAY Zsuzsa, H.)
– Unuopaj metodoj en la fremdlingvo-instruado (KOVÁCS Márta, H.)
– Segmentado de la studmaterialo (B.Zs.)
– Evoluigo de la kvar komunikaj kapabloj (K.M.)
pri skribo kaj parolkompreno (K.M.)
pri legokapablo (B.Zs.)
pri stimulado je parolo per dialogoj, situacioj kaj skeĉoj prezentado de skeĉo kun metodikaj klarigoj; Stefan MACGILL,(NZ/H)
– Interfero, transfero, propedeŭtika rolo de Esperanto (B.Zs.)

Rumania triopo: Aliz BALÁZS, Edit VASS kaj Ildikó FEKETE prezentis fragmenton de studmaterialo, kiun ili mem kompilis por 6-7 jaraj infanoj. La materialo el didaktika kaj komunika vidpunktoj estas bone pripensita.

2). Lingvokurso komenciĝiis unu semajnon pli frue. Ekde la 2-a de aprilo ĝis la 7-a gvidis ĝin FARKAS-TATAR Éva. La intensa kurso havis 7 horojn tage kun 12–13 lingvolernantoj diversaĝaj. La serena atmosfero de la kurso, la speciale por tiu grupo kompilita materialo, la aplikata instrumaniero, krome la modela diligenteco kaj lernemo de la kursanoj rezultis rapidan progreson. Ekde la komenco de la IMS, do en la dua semajno la kursgvidadon transprenis BAROSS–KÓRÓDY Zsófia, kiu – konsiderante la ekzamenpostularon – celkonscie preparis la kursanojn al la ekzamenoj.

3). Samtempe Stefan MACGILL preparis al la meza grado de ILEI/UEA–ekzameno per abundaj informoj pri la ekzamensistemo kaj pri kelkaj ĝiaj temoj iom detale.


Malgraŭ la malfavoraj cirkonstancoj de Esperanto en Rumanio en la lastaj jar(dek)oj, multaj parolas la lingvon bone, kaj kelkaj eĉ librojn, revuojn sukcesis iel akiri (tamen la manko de literaturaj ktp. legaĵoj estas forte sentebla).

Sume: el inter 38 partoprenantoj 21 trapasis ekzamenon; 9 en elementa, 12 en meza nivelo (inter ili 2 kun kvalifiko „kontentiga", 8 „bona" kaj 2 „tre bona". Tiu ĉi nombro de sukcesaj ekzamenoj distingas la 9-an IMS-n inter ĉiuj ĝisnunaj ekzamensesioj de la nuna ekzamensistemo de UEA/ILEI; krome inter ĉiuj ĝisnunaj IMS-oj, ĉar nun la unuan fojon estis ebleco submetiĝi al ekzameno en IMS. La ekzamenkomisionon SMG gvidis.

Krom la metodikaj temoj kaj la ekzameno okazis prezentado fare de Kornélia NAGY (R) pri soroban-kalkulado. Tiu „arto" surprizis plurajn seminarianojn Unu el ili ravite-diris: Sorobano estas miraklo, kiel Esperanto mem!

Temis ankaŭ pri refondo aŭ oficialigo de Rumania ILEI-sekcio (ĝi estis organizita jam antaŭ pli ol unu jardeko, sed oficialigi ĝin oni ne sukcesis). Laŭ la propono de esperantistoj el Bukareŝto, la decidon faru la estrarkunsido de Rumana Esperanto-Asocio, somere, en sia kunveno.

La seminario ĝuis publikecon en la urbo Odorheiu Secuiesc. La solena malfermo okazis en la urbodomo. La urbestro, FERENCZY Ferenc mem faris trilingvan salutparolon (H, R, E) kaj gastigis ĉiujn seminarianojn. En la urbo – samtempe kun nia seminario – okazis aliaj klerigaj konferencoj por instruistoj kaj bibliotekistoj, krome internacia simpozio pri la instruado de historio, kun partopreno de rumanaj, germanaj kaj hungaraj ekspertoj. En tiu ĉi simpozio estis ebleco, ke Marian CONSTANTINESCU, vicprezidanto de REA, krome Stefan MACGILL, kaj KOVÁCS Márta, en akompano de Kornélia NAGY, prezentu nian seminarion. La adiaŭan vesperon la organizantoj aranĝis en kulturdomo kun folklora programo de loka amatora ensemblo.



Unu el naŭ sukcesintoj en la elementa nivelo de la ekzamenoj de UEA/ILEI, f-o Csaba SZÁSZ.

Ni havis ankaŭ tre belan tuttagan ekskurson per aŭtobuso tra Odorheiu-Secuiesc, Lupeni/Farkaslaka (tombo de la verkisto TAMÁSI Áron), ni vizitis la salminejon en Praid/Parajd, la faman kuracbanlokon Sovata, ni admiris kaj aĉetis ceramikaĵojn en Korund/Korond, ni admiris ankaŭ la belege skulptitajn lignopordegojn en la banloko Seiche/Szejkefürdő, kie troviĝas ankaŭ la tombo de la sciencisto-sociografo ORBÁN Balázs.

Ĝeneralaj impresoj pri la 9-a IMS

Krom la fakaj, t.e. metodikaj kaj ekzamenaj sukcesoj ni havis ankaŭ altan kaj profundan moralan travivaĵon, nome ke esperantistoj-rumanoj Rumaniaj hungaroj kaj Hungariaj hungaroj amike, harmonie kunlaboris, intime interparolis.

La Rumaniaj esperantistoj akceptis kaj donacojn-esperantaĵojn kaj ekzamenadon (!) de la Hungariaj esperantistoj. La hungaraj esperantistoj eksciis multe de la rumanoj:

– ke la malnovaj esperantistoj konservis sian espsrantistecon dum la malfacilaj jar(dek)oj,
– ke en Bukareŝto okazas E-lingvokurso ĉiusemajne en la junulara(!) radioprogramo, kiun gvidas Marian CONSTANTINESCU,

– ke en Timiŝurbo centoj studas Esperanton en la Universitato sub gvidado de Angela STOICA; kie la Interlingvistika rondo, gvidata de prof. Ignat BOCIORT neniam ĉesis
– ke en Sibiu jam funkcias filio de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS); la filion gvidas prof. Vasile ALBU.
– ke lernolibro estas verkata kaj la historio de la Rumania E-movado estas prilaborata.

Rilate al la organizado ni devas noti, ke Kornélia NAGY kun granda entuziasmo faris bonajn surlokajn aranĝojn rilate al la ejoj, priservoj kaj programoj. Kun sia kunlaborantino, Lenke-Anna SZÁSZ ŝi kreis serenan atmosferon, luksan gastigadon, intiman ortodoksan pasko-vesperon, ili plenumis ĉiujn bezonojn, prizorgis donacojn folklorajn al ĉiu seminariano; do ili konscience kaj bonkore kontribuis al la sukceso de la seminario. Dankon al ili. La IMS-n pliinternaciigis po unu gasto el Korea Respubliko kaj el Hispanio.

Perspektivo rilate al la 10-a IMS

Laŭ la Rekomendoj de la 8-a IMS en Kaunas (Litovio) ni povas antaŭvidi du gravajn temojn por la 10-a IMS, nome

– lingvopedagogiaj spertoj pri intensaj lingvokursoj kaj
– pedagogia/metodika terminologio en Esperanto.

Espereble ni povos okazigi la 10-an IMS-n kunlabore kun la Terminologia Esperanto-Centro en Zagrebo, kie IKS realigas ankaŭ intensajn lingvokursojn laŭ la „Zagreba Metodo", resp. sistemo.

Budapesto, 1991-04-26.
BARCSAY Zsuzsa

Lingvoinstruisto serĉata

Jam tutmondan famon akiris la eksperimenta bazlerneja klaso de la Fondaĵo Talento, kie 12 infanoj ellernis Esperanton tiel, ke ili jam lernas kelkajn aliajn studobjektojn *per* Esperanto. Post du jaroj de Esperanto-lernado, la 8-jaraj infanoj komencos lerni (ĉi-septembre) la duan fremdan lingvon. Estus tre grave por la eksperimento kaj ankaŭ por la disvastigo de Esperanto, se la duan lingvon instruus al ili denaska parolanto de la koncerna lingvo – pere de Esperanto. Do ni serĉas instruist(in)on, kiu flue parolas Esperanton kaj povus instrui intense la anglan, francan, germanan, hispanan aŭ italan lingvon al la infanoj dum almenaŭ du jaroj. Ni garantios por ŝi/li senpagan loĝadon kaj salajron sufiĉan por normalaj vivo kaj laboro en Hungario. Pedagogoj pretaj entrepreni tiun ĉi unikan taskon, bonvolu urĝe skribi al la Fondaĵo Talento, Budaörs, Pf. 102. H–2041, Hungario; telefono: (36–1) 153–7154 aŭ 173–3008; LUKÁCS András, sekretario.

Ni daŭrigas la prezenton de la diplomiga disertacio de Katalin Strobl ĉe la Universitato ELTE en Budapeŝto: 'Apliko de la komunika metodo en la instruado de Esperanto', komencita en la antaŭa numero de IPR.

KOMUNIKA ESPERANTA LERNOLIBRO

2.1. KOMUNIKA METODO EN ESPERANTO

Malgraŭ tio, ke Esperanto estas simpla, facile lernebla lingvo, oni ofte trovas, ke ĝuste la komunika kapablo mankas al la studentoj. Lingvaj kursoj kaj instrulibroj okupiĝas tro pri la struktura ekzercado, anstataŭ koncentri al la komunikado mem. En kazo de naciaj lingvoj oni dediĉas multe da tempo por struktura praktikado, ĉar la lingvoj konsistas ankaŭ el neregulecoj (fonetikaj, morfologiaj, leksikaj), kiujn la lernantoj devas enkapigi helpe de la instruisto. Esperanto, aliflanke, ne bezonas tiomgradan koncentradon al la struktura sistemo. Oni povas mem lerni la logikajn regulojn, legi librojn aŭ skribi leterojn, sed kion oni ne povas sole fari, estas ĝuste la komunikado. Gravus, ke dum la kurso la lernantoj ekzerciĝu al la komunika kapablo.

Claude Piron mencias – krom la struktura – iun alian avantaĝon de Esperanto. En naciaj lingvoj la tradicioj, la lingvaj kutimoj ludas gravan rolon kaj determinas iomgrade ankaŭ la lingvouzon. Ofte estas ege malfacile, trovi la ĝustan, la solan esprimon el la multaj sinonimoj de unu vorto. Dum la gepatralingvanoj havas la avantaĝon, elekti ĝin je la unua rigardo, la fremdlingvanoj bezonas multe da lingvopraktikado por decidi, kiun vorton uzi. Esperanto ne havanta tiujn limojn, baziĝante sur logika sistemo, ebligas la uzanton apliki la regulojn pli libere (vojaĝi per trajno, vojaĝi trajne, trajni). Tiu libera lingvouzo stimulas la kreivecon. Por instigi la studentojn al tiu-ĉi kreiveco mi kolektis kelkajn ekzercojn en la modelleciono.

2.2. STRUKTURO DE LA LIBRO

Nun mi intencas prezenti, kiel mi imagas iun komunikan Esperantan lernolibron. Ĉiuj ĉapitroj konsistus el 3 partoj: La ekzercoj sekvas unu la alian laŭ facileco. La preparaj taskoj lernigas kaj refreŝigas vortojn, esprimojn bezonotajn poste. Malgraŭ, ke ili ĉefe celas plivastigi la specialan vortprovizon, ili samtempe taŭgas ankaŭ por gramatika praktikado. Kelkaj ideoj koncerne la unuopajn ekzercojn troviĝas en "Rimarkoj al la instruisto".

La komunika parto baziĝas sur la preparaj taskoj. Ĝi enhavas ekzercojn (rolludojn, diskutojn, ludojn) kiuj postulas jam iomgradan kreivecon de la studento. Ili celis evoluigi la komunikan kapablon kaj alkutimigi la lernantojn al libera konversacio, helpe de la vortoj, lernitaj dum la prepara fazo. Tiu-ĉi parto konsistas ankaŭ el stilaj ekzercoj por progresantoj.

La kontrolaj demandoj, fine, fokusas al la plej gravaj punktoj de la leciono, resumas la temojn kaj ebligas al la instruisto, denove trairi la materialon pere de kontrolita ekzercado.

2.3. ENHAVO

Mi grupigis la situaciojn en 9 temojn kiuj sekvas unu la alian laŭ ĉiutaga ofteco kaj graveco. La lasta ĉapitro resumas kaj ripetas la antaŭajn. Por prezenti miajn konceptojn pli detale, mi elektis unu el la temoj kaj verkis la modellecionon "80 tagoj ĉirkaŭ la mondo".

ENHAVO

1. SALUTON!
   (renkontiĝo)
2. JEN LA FAMILIO!
   (familio, parencaro, profesio)
3. VIZITU NIN HEJME!
   (hejmo, loĝejo, hejmlaboro)
4. KIEL MI ASPEKTAS?
   (modo, vestado)
5. **ĈIRKAŬ LA MONDO EN 80 TAGOJ** (detaligita ĉi-sekve)
   (orientiĝo, trafiko, vojaĝo)
6. ĈU VI ANKAŬ KUNBICIKLAS?
   (libertempo: hobioj, sportoj)
7. DU BILETOJN POR VESPERO!
   (kulturo: literaturo, filmo, teatro, koncerto)
8. BONAN APETITON!
   (aĉetado, manĝoj)
9. ĈU VI HAVAS KAPDOLORON?
   (hospitalo, ĉe la doktoro)
10. ĜIS REVIDO EN LA KONGRESO!
    (ripetado)


2.4.a PREPARAJ EKZERCOJ

1.TROVU LA SINONIMOJN!

numerplato	konduki
ŝofori	aviadilo
tintilo	licencplato
flugmaŝino	sonorilo
matroso	vagonaro
trajno	maristo

2.TROVU LA ANTONIMOJN!

halti	komenco
superpasejo	tiri
vakanta	subpasejo
urbocentro	okupata
puŝi	starti
fino	antaŭurbo




3.FORMU KUNMETITAJN VORTOJN!

front-	rado
dent-	vagonaro
var-	rako
lokomotiv-	estro
bilet-	lampo
valiz-	giĉeto
ŝarĝ-	aŭto


4. FORMU LA VICORDON LAŬ:

GRANDECO	KOMFORTECO	RAPIDECO
remboato	buso	tramo
velŝipo	aviadilo	trolebuso
pramŝipo	ŝipo	biciklo
pasaĝerŝipo	trajno	metroo
aviadilŝipo	aŭtomobilo	aviadilo

5.a ORDIGU LA VORTOJN!



ambaŭ




_____	_____	_____
_____	_____	_____
_____	_____	_____
_____	_____	_____
_____	_____	_____
_____	_____	_____

sidloko, selo, spegulo, stirrado, frontlampo, selsako, kofro, pedalo, ĉeno, rapidometro, rado, tintilo, glacoviŝilo, bremso, numerplato, pumpilo, stirilo, akcelpedalo

5.b KIO POVAS...

- elreliĝi
- truiĝi
- panei
- rompiĝi
- fali ?




6. VOJAĜO PER AVIADILO

FORMU LA VICORDON!

- enaviadiliĝi
- aĉeti flugbileton
- trairi la pasportan kontrolon
- iri al la flughaveno
- ricevi invitleteron
- ricevi vizon
- pesigi la valizon
- alkroci la sekureczonon
- atendi en tranzitejo
- trairi la doganejon
- aĉeti tabakon
- mansigni al geamikoj

7.a FORMU VORTOJN!

bilet /	
sign /	
halt /	-isto
dogan /	-ejo
kontrol /	-ilo
atend /	
pump /	
fajf /	




7.b DIFINU LA VORTOJN LAŬ LA EKZEMPLO!

Ekzemplo
Kontrolisto estas iu, kiu kontrolas la biletojn.
Atendejo estas ejo por atendi.
Pumpilo estas ilo por pumpi.
NUN DAŬRIGU !

7.c „ESPERANTIGU" LA VORTOJN!

Ekzemplo kapitano – ŝip-estro
garaĝo –
giĉeto –
kupeo –
haveno –
matroso –



7.d KLARIGU AL LA ESPERANTISTA KANIBALO "TOBO" KION SIGNIFAS LA SEKVAJ HUNGARAJ VORTOJ:

1. metró [subtera urba trajno]
2. libegő [seĝa telfero]
3. biztosítás [asekuro]
4. sikló [kable tirita monta trajno]
5. MÁV [Hungara Ŝtata Fervojo]
6. HÉV [Antaŭurba pendoltrajno]
7. fogaskerekű [dentrada trajno]
8. napijegy [taga bileto]
9. MALÉV [la hungara flugkompanio]

8. TRAFIKA REGULARETO


8.a KION SIGNIFAS LA TRAFIKTABULOJ!



8.b. Okazis akcidento. KION DIRUS LA POLICISTO?


(vi devintus
vi ne rajtis)

turniĝi,
halti,
atendi,
eniri,
bremsi,
antaŭi,
doni prioritaton,
rekten iri
bicikli



TESTO : POVAS, RAJTAS, DEVAS ?

Ĉi-tie oni...
rapide konduki



Ĉi-tie oni...
bremsi



Ĉi-tie oni...
eniri per aŭto



Ĉi-tie oni...
dekstren turniĝi



Ĉi-tie oni...
halti



Ĉi-tie oni...



Ĉi-tie oni...
eniri




Ĉi-tie oni...
bicikli



Ĉi-tie oni...
piediri



Ĉi-tie oni...
halti



Ĉi-tie oni...
parki



Ĉi-tie oni...
atendi



Ĉi-tie oni...
dekstren turniĝi



Ĉi-tie oni...
telefoni



Ĉi-tie oni...
bicikli



Ĉi-tie oni...




Ĉi-tie oni...
eniri



Ĉi-tie oni...



9. ĈU VI POVAS DIRI AL MI?



9.a Unuflankaj konversacioj: KOMPLETIGU LA DIALOGOJN

1. „.....”
„Vi iras rekten ĝis la unua trafika lampo kaj turniĝas dekstren. Ĝi estas ĉe la komenco de la strato.”

2. „Ĉu vi povus diri al mi kie estas la naĝejo?”
„.....”

3. „.....”
„Ĉiujn du minutojn.”

4. „Kioma haltejo estas la naĝejo?”
„.....”

5. „.....”
„Jes. Estus pli bone preni la buson numero 6.”

6. „Kie estas la plej proksima haltejo?”
„.....”

9.b DONU DIREKTOJN!
Sinjoro Tobo ankoraŭ ne loĝis en urbo. Nun li tranoktas en hotelo Hilton.
DIRU AL LI, KIEL IRI AL LA

iru rekten dekstren maldekstren	turniĝu ĉe la komenco fino	restoracio poŝtoficejo banko naĝejo teatro
tra, apud, inter, antaŭ, malantaŭ		

9.c KLARIGU AL TOBO KIEL UZI LA METROON, TRAMON?
KIEL ASPEKTAS BUSO
POLICISTO ?
KIEL AĈETI TRAJNBILETON?

9.d ARANĜU PROGRAMON POR LI HELPE DE LA MAPO!

9.e Vi estas Tobo. RAKONTU KIEN VI IRIS DUM LA TAGO!

9.f BONVOLU DIRI AL MI! (En vojaĝagentejo)

„Bonvolu diri al mi, kiam alvenas trajnoj el Vieno?”
ekveturas trajnoj al Vieno?”
„Ĉiutage venas du trajnoj : unu je la 12-a kaj 40
iras kaj la dua je la 19-a. ”

DAŬRIGU LAŬ LA EKZEMPLO !


Vieno	Parizo	Pekino	Varsovio	Londono
12.40	10.42	12.06	20.04	8.32
19.00	11.05	20.01	6.52	13.27



10. REKORDOJ !!!!



DEMANDU! RIGARDU LA DESEGNAĴOJN!



35 homoj 1896.

Londono Leonardo

49 cm 221 km²

Belgio Mexico City

60000 1977.

1493. King Ghalid

20.4 Siemens/Halske ????

En la sekvonta IPR ni prezentos la lastan parton de la laboraĵo, kiu donas pli produktivajn komunik-postulajn ekzercojn kaj klarigojn por instruistoj.

Pri la sekcioj de ILEI en 1990

Je nia jara demandilo al la sekcioj alvenis nur deko da respondoj. Jen do, iom fragmenta trarigardo pri la strukturo kaj agado de la sekcio en tiuj kelkaj landoj, kiuj pretis liveri informojn. La instrua agado estis jam prezentita tra enketo en la pasintaj jaroj. (v. IPR 89/1. 90/2.)

Sekcio: Aŭstrio
Estraro: unukapa
Oficperiodo: –
Pagintaj membroj: 14
el tiuj profesiaj instruistoj: 2 (+kelkaj emeritoj)
Jarkunveno: –
Informilo/bulteno: laŭbezona cirkulero; 1–2-paĝa
Prelegantoj en lernejoj bonvenaj: –

Sekcio: Britio
Estraro: dekkapa
Oficperiodo: 1 jaro
Pagintaj membroj: ĉ. 100
el tiuj profesiaj instruistoj: ĉ. 75
Jarkunveno: dum Brita Kongreso
Informilo/bulteno: „Esperanto Teacher"; trifoje jare; 12–16-paĝa
Prelegantoj en lernejoj bonvenaj: laŭ interkonsento

Sekcio: Brazilo
Estraro: ?kapa
Oficperiodo: ?
Pagintaj membroj: 30
el tiuj profesiaj instruistoj: 15
Jarkunveno: du kunvenoj jare
Informilo/bulteno: –
Prelegantoj en lernejoj bonvenaj: jes

Sekcio: Ĉeĥio
Estraro: kvinkapa
Oficperiodo: 3 jaroj
Pagintaj membroj: 5
el tiuj profesiaj instruistoj: ?
Jarkunveno: ?
Informilo/bulteno: –
Prelegantoj en lernejoj bonvenaj: –

Sekcio: Ĉinio
Estraro: kvinkapa
Oficperiodo: ?
Pagintaj membroj: 38
el tiuj profesiaj instruistoj: 24
Jarkunveno: –
Informilo/bulteno: „Esperanto-Instruado"; jara; 15-paĝa; „Informilo"; duonjara; 4–6-paĝa
Prelegantoj en lernejoj bonvenaj: jes

Sekcio: Estonio
Estraro: kvinkapa
Oficperiodo: 3 jaroj
Pagintaj membroj: 35
el tiuj profesiaj instruistoj: 26
Jarkunveno: jes
Informilo/bulteno: –
Prelegantoj en lernejoj bonvenaj: jes

Sekcio: Germanio –- eksGDR, sekve ĉio transformiĝantas
Estraro:
Oficperiodo: ?!
Pagintaj membroj: membraro = Metodika Komisiono de GDREA
el tiuj profesiaj instruistoj: 6
Jarkunveno: –
Informilo/bulteno: –
Prelegantoj en lernejoj bonvenaj: –

Sekcio: Hungario
Estraro: 2–5-kapa
Oficperiodo: 3 jaroj
Pagintaj membroj: 57
el tiuj profesiaj instruistoj: 49
Jarkunveno: en ĉiu februaro kadre de Landaj Pedagogiaj Tagoj
Informilo/bulteno: cirkulero; jara; 1–2-paĝa
Prelegantoj en lernejoj bonvenaj: jes

Sekcio: Italio
Estraro: elektata
Oficperiodo: 3 jaroj
Pagintaj membroj: 90
el tiuj profesiaj instruistoj: 85
Jarkunveno: okaze de Itala Nacia Kongreso
Informilo/bulteno: –
Prelegantoj en lernejoj bonvenaj: –

Sekcio: Nederlando
Estraro: kvarkapa
Oficperiodo: 3 jaroj
Pagintaj membroj: 59
el tiuj profesiaj instruistoj: ?
Jarkunveno: jes
Informilo/bulteno: „N.G.G.E. sciigas"; trifoje jare
Prelegantoj en lernejoj bonvenaj: jes, kelkfoje.

Sekcio: Usono
Estraro: kvinkapa
Oficperiodo: 2 jaroj
Pagintaj membroj: 89
el tiuj profesiaj instruistoj: 45
Jarkunveno: ĉiun julion kadre de EL-NA-kongreso
Informilo/bulteno: A.A.I.E. Bulteno; kvaronjara; 14–16-paĝa
Prelegantoj en lernejoj bonvenaj: –

La sekcio estas
- memstara kaj jure registrita en: *Britio, Hungario, Nederlando*
- memstara sed ne jure registrita en: *Aŭstrio, Ĉinio, Estonio, Italio, Usono*
- eduka fako de la Landa Asocio de UEA: *Ĉeĥio, eksGDR*
- alia modelo: *Brazilo (ligita al E-Asocio de San-Paŭlo)*

La agado de la sekcioj *konsistas el* **varbado** inter lernantoj kaj instruistoj per flugfolioj (GB), per afiŝoj, anoncoj (BR), dum lingvaj foiroj, kongresoj (GB, A, H, Usono), en jarkatalogo de kulturaj aktivecoj (I); okazigo de **kursoj** (por pedagogoj: Estonio), en ĵurnalo (Ĉeĥio), **korespondaj kursoj** (GB, eksGDR); aranĝo de **metodikaj kunvenoj, konsultiĝoj** (NL, Ĉinio, H); kunlaboro en la **asociaj ekzamenoj** (Ĉeĥio). **Artikoloj** en nemovadaj pedagogiaj revuoj lige al E-o aperadas en GB, Estonio, eks-GDR, H. **Prelegoj** en pedagogiaj medioj maloftas, krom en kelkaj landoj, ekz. Usono: en EXPO-LINGUA (A), en Kongreso de A.E.D.E. (I), de Amerika Asocio de Modernaj Lingvoj (Usono). **Kontaktoj kun aŭtoritatuloj:** kun deputito de Eŭropa Parlamento (I) proponante E-on kiel komunan Eŭropan lingvon – respondo atendata; kun registaro (NL) lige kun lerneja politiko; kun Kleriga Ministerio (Estonio) por financi pedagogiajn aranĝojn – estas tre bonaj, fruktozaj kontaktoj; kun Ministro pri Scienco (A) por ebligi universitatan instruadon de Es-

peranto —- prelegoj eblas, memstaraj studfakoj pro monmanko, ne; kun diversaj regionaj/lokaj instancoj (Ĉinio) por okazigi kursojn, ekzamenojn, seminariojn.

Kiel imitindaj iniciatoj *estas menciitaj la jenaĵoj:* senpagaj korespond-kursoj havebligitaj en publikaj bibliotekoj; studarangoj por pedagogoj (lingvaj kaj metodikaj); verkigo/eldono/reeldono de valoraj lernolibroj; invito de eksterlandaj esperantistoj, por ke ili prezentu sian landon; prezentigo de lernantoj antaŭ ne-esperantista publiko.

Kompilis: Kovács M.

Deklaracio de rajtoj de Eŭropa lernejano

„La infanoj de Eŭropo" estas nova societo laboranta ekde 1987 en malgranda franca urbeto Bèze proksime ĉe Dijon. Profesoro Michel Feuchot, nun prezidanto de la Societo de Infanoj de Eŭropo (Communauté des Loupiots d'Europe) komencis okupiĝi per la ideo aranĝi renkontiĝojn kaj konatigojn de Eŭropaj infanoj. Se ni deziras, ke Eŭropo unuiĝu, estas saĝe komenci ĉe la infanoj.

La unua renkontigo de „La infanoj de Eŭropo" okazis en Strasburgo, la dua en Bèze kaj la tria okazas nun en la Ĉeĥoslovaka urbo Brno (1991–06–20/24) sub auspico de ministroj pri instruado kaj kulturo de Ĉeĥoslovakio kaj Francio. Partoprenas infanoj el Belgio, Ĉeĥoslovakio, Francio, Germanio, Hispanio, Jugoslavio, Nederlando, Portugalio kaj Svislando.

La ĉefa temo de la rekontigo estas aprobi la deklaracion pri la Rajtoj de Eŭropa Lernejano. Tio donas novajn ŝancojn al ni utiligi Esperanton. Anstataŭ petegi UNESKOn pri aprobo de la Internacia Lingvo, estos pli efike helpi pere de Esperanto al unuigo de Eŭropo, ĉefe ĉe la plej juna generacio. La Eŭropaj infanoj bezonas interkompreniĝi kaj estas konate, ke kiam ili lernas mondlingvojn, ili ne plu estas infanoj, kiam ili atingas sufiĉan lingvo-scion. Esperanto ebligas baldaŭan komunikadon, kaj samtempe donas bazon por studado de pluaj lingvoj (la t.n. propedeutikaj kvalitoj de Esperanto). Tio esta tre grava, ĉar nun ankoraŭ ne sufiĉas lerni la Internacian Lingvon kiel solan fremdlingvon, kaj ĉefe la gepatroj rigardas Esperanton malamike, se ili vidas en ĝi obstaklon sur la vojo al la mondlingvoj. Ni devas konvinki ilin, ke Esperanto ne estas malamiko de la mondlingvoj, male ĝi malfermas a pordegon al fremdaj lingvoj.

Dum la renkontigo en Brno oni kantos kanton *Koro* speciale komponitan por ĝi. Estas preparita ankaŭ Esperanta versio. Do unua paŝo jam estas farita. Nun gravas, ke la esperantistoj paŝu tiun vojon plu. Pli efike estas helpi per Esperanto al Eŭropo, ol postuli, ke Eŭropo helpu Esperanton. M. MALOVEC (CS)

Komento pri la raportoj de la sekcioj

La sekcioj de nia Ligo estas fundamenta elemento de ĝi. Multo, eĉ plimulto de la utila laboro de ILEI devas realiĝi tra la sekcioj. Kvankam nia membraro kreskas tre kuraĝige (v. fine de la numero), la stato de pluraj sekcioj estas zorgiga. Indus, ke en la nova estraro estu estrarano, specife taskita pri flego de rilatoj kun la sekcioj kaj tra ili, kun la membraro. Estas dezirinde fondi novajn sekciojn, sed eble pli grave interveni, kie sekcio de jaro al jaro ne raportas, kaj kie fakte la sekcio ĉesis funkcii, eĉ se estas agantaj instruistoj en la lando. Interveni enlande estas delikata tasko por la internacia estraro, sed kelk-kaze tio necesos. La altiro de precipe junaj instruistoj, aktive instruantaj aŭ povantaj oficiale instrui la lingvon (eventuale eĉ neparolantoj, kiuj estas konvinkeblaj lerni kaj apliki ĝin en la instruado) devas esti alta prioritato en ĉiu sekcio.

Kompreneble, la fakto ke sekcio raportas, ne garantias, ke ĝi aktivas, ankaŭ inverse. Rigardante la liston de raportintoj, eblas en preskaŭ ĉiu kazo ligi tion kun konate aktiva individuo, plejofte la sekciestro. La reagemo tra la lastaj du jaroj parolu por si mem, kaj en Voss ni kazon post kazo arigu ĉiujn eblajn informojn pri la silentintaj landoj.

Raportis ambaŭjare: Aŭstrio, Brazilo, Britio, Ĉeĥio, Ĉinio, Estonio, Germana DR, Nederlando, Nordameriko.

Raportis en 1991: Italio.

Raportis en 1990: Argentino, Finnlando, Zairio.

Tute ne raportis: Belgio (nova sekciestro jus ekdeĵoras), Bulgario (nova sekcio), Francio, FR Germanio (survoje al fandigo), Hispanio, Israelo, Japanio, Jugoslavio, Koreio, Norvegio (ne estas sekciestro), Pollando (same), Portugalio, Sanmarino, Slovakio, Sud-Afriko, Svedio, Svisio, Venezuelo.

Kun eventualaj pardonpetoj al suferintoj de poŝtaj mistraktoj, oni tamen devas konstati, ke la lasta kategorio estas nepre la plej granda. Jen urĝa tasko por la nova estraro.

smg.


AMERIKA SEKCIO MODELE AKTIVA

AAIE regule sendas al IPR sian kvaronjaran bultenon. La aprila numero malkovras, ke la renomaj Sanfranciskaj someraj kursoj ne estas la solaj. Oficialan 10-tagan kurson ofertas Gaston College, Dallas, NC kontraŭ $150. Kvintagan trinivelan Western Michigan University kontraŭ $130, 12-tagan Meredith College, Raleigh, NC. Kvintagan la Universitato de Hartford, CT kun instruistoj J.C. Wells kaj Humphrey Tonkin. Ĉiuj kursoj donas kreditojn al studentoj, do estas rekonataj, kaj pagendaj. Jen agadmaniero, instrua kaj imitinda en aliaj mondpartoj. AAIE raportas 15 konatajn kursojn tra Usono: en Alasko, Kalifornio, Montano, Nebrasko, Teksaso kaj Virginio. La jarkunveno de AAIE kun elektoj por dujara periodo okazos en Raleigh, NC en julio. *L.*

Instruado en Hungario en 1990/91.

Kiel ĉiujare, en Hungario oni modele enketas pri la instruado kaj havas precizajn kaj detalajn informojn pri tio. Jen resumo de la ricevitaj respondoj:

Infan-lernejoj	30
Elementa lernejo: subaj klasoj	190
Elementa lernejo: superaj klasoj	573
Mezlernejoj: fakaj	410
Mezlernejoj: gimnazioj	375
Altlernejoj (inkl. instruistaj trejnejoj)	217
Universitatoj:	37
Plenkreskuloj:	132
SUME	1950



11 el la universitatanoj estas eksterlandanoj. Signifa parto de tiuj lernantoj studas en oficialaj klasoj. La kursoj okazas en Budapeŝto, Pécs, Kecskemét, Kiskunhalas, Sarkad, Miskolc, Abaújszánto, Alsózsolca, Hernádnémeti, Tokaj, Szirmabesenyő, Szerencs, Sárospatak, Sopron, Eger, Mátrafüred, Fuzesabony, Lábatlan, Dejtár, Ságújfalu, Magybotony, Vác, Dunakeszi, Gomba, Nagykovácsi, Felsőpakony, Albertirsa, Sárszentlorinc, Szombathely, Várpalota, Pápa, Kisgorbo, Zalaber, Kenidakustány; t.e. en 14 el la 19 provincoj.

Interkontinenta vizito

La Esperanto-lernejo en la Universitato de Ekpoma, Nigerio, bonvenigis en aprilo ambasadorojn de la Legio de Bona Volo el Brazilo, kiuj vizitis tiun landon kaj ankaŭ Ganon.

Nova deĵorperiodo de ILEI: elekto de nova estraro en Voss:

ALVOKO

La komisiito pri elektoj 1991 atendas ankoraŭ reagojn de pluraj sekcioj al la cirkuleroj de 1990-12-02 kaj 1991-05-11 pri tio, kiujn la sekcioj proponas kandidatigi por la nova estraro.

Kandidato devas esti membro de la Ligo, devas kontentige paroli Esperanton kaj esti sperta pri iu laborfako. Rektaj laborkostoj estas kompensataj (afranko, telefono ktp.) kaj 80% de la vojaĝkostoj al unu estrar-kunsido.

Ĝis nun (26 junio) respondis 12 sekcioj el 32. 6 faris proponojn, 6 ne. 14 kandidatoj estas proponitaj, sed 5 el ili ne akceptas, aliaj 5 ne respondis, fine 4 estas pretaj submetiĝi al la proceduro. Ĉiuj 4 estas eŭropanoj; aliaj kontinentoj estu reprezentataj, precipe kie grandaj viglaj sekcioj funkcias. Pliaj kandidatoj necesas ankaŭ ĉar tri el la nunaj estraranoj anoncis intencon ne rekandidatiĝi.

ILEI intencas vastigi la laborterenon je kelkaj novaj fakoj, ekzemple: servoj al instruistoj (inkl. starigo de interklasaj kontaktoj), trejnado de instruistoj, rilatoj kun sekcioj ktp. Ni atendas kunlaborantojn! Proponojn bonvolu sendi al BARCSAY Zsuzsa, Esperanto-Centro, Pf. 1450, D-W-4790 Paderborn, Germanio aŭ kunportu al Bergen aŭ Voss.

Gramatiko:

PO – DISTRIBUA PREPOZICIO

Odd TANGERUD, Norvegio

Zamenhof prenis la prepozicion **po** el la rusa lingvo. De tiu momento ĝi estas Esperanta vorto, kaj devas esti traktata kiel tia kaj laŭ Esperanta lingvosento. Li decidis, ke po regu nombron aŭ esprimon de mezuro. Li donis la ekzemplon: „Ili ricevis po kvin pomoj." Bedaŭrinde li ne donis iun gramatikan analizon de la frazo, por tiel klarigi kial li ne uzis la akuzativon, ĉar temas ja fakte pri objektoj, kiujn oni ricevas. Li nur skribas: „...ambaŭ esprimoj estas uzeblaj kaj bonaj..." Tio kondukis al la stato, ke gramatikistoj donis malsamajn regulojn pri la uzo de **po**. Mi multe cerbumis por trovi solvan klarigon kaj jen ĝi en tiu ĉi artikoleto.

En la ekzemplo de Zamenhof la verbo „ricevis" estas transitiva. Oni do atendus rektan komplementon post ĝi, sed tia komplemento ne ekzistas. La esprimo „po kvin pomoj" estas adverba esprimo de mezuro. En tiu esprimo „pomoj" ne estas rekta komplemento, kaj sekve ne havu la finaĵon -n. Ĝi estas parto de la mezuro kaj ludas adverban rolon en prepozicia esprimo. La frazo de Zamenhof do ne estas kompleta gramatike, ĉar mankas al ĝi rekta komplemento. Se ni aldonas tian komplementon, ni havos jenan frazon: „Ili ricevis pomojn po kvin pomoj."

Ĉar la rekta komplemento kaj la substantivo de la mezuro estas la samaj vortoj, unu el ili estas superflua por la kompreno kaj por la eleganteco de la frazo. Zamenhof preferis forstreki la rektan komplementon kaj reteni la substantivon de la mezuro. Tamen eblas ankaŭ forstreki la substantivon de la mezuro se la senco estas klara. Ekzemple: „Ili kunprenis la pomojn po kvin." Jen mi retenis la rektan komplementon, kaj kripligis la esprimon de mezuro, ĉar ĉiuj komprenas, ke temas pri „po kvin pomoj".

La esprimo de mezuro respondas al la demando „Kiel?", do adverba respondo. Se mi skribas „Ili kunprenis po kvin.", neniu komprenas, pri kio temas. „Po kvin" estas kripligita esprimo de mezuro. Aŭ ni konservu la rektan komplementon, aŭ ni skribu la kompletan esprimon de mezuro.

La rekta komplemento devas sekvi la transitivan verbon, kaj tiel antaŭi la esprimon de mezuro. Ekzemplo: „La plenkreskuloj kunprenis la infanojn po tri."

Izolite „po tri" ne donas iun signifon, sed ĉar mi ne bezonas skribi la kompletan komplementon „la infanojn", mi ne bezonas skribi la kompletan mezuran esprimon, ĉar ni scias pri kio temas.

Recenzetoj

TIU TOSKANA SEPTEMBRO de Corrado TAVANTI kaj István ERTL, Hungara Esperanto-Asocio, 137 paĝoj, 1a eldono 1990, formato A/5, ISBN 963 571 128 X.

En parko, kovrita de foliamaso, oni trovas la kadavron de bela knabino. Post longa enketado oni trovas la murdinton. La legado de ĉi-tiu krimromano estas ĝuo pro enhavo kaj stilo. La parte detala priskribo de „flankaj aferoj" vivigas personojn kaj situaciojn. Ofte oni renkontas nekutimajn, sed trafajn vortformojn: „elventrigi" (anstataŭ naski); la „ŝovoj kaj movoj" de taksio; „rigardi ĉue"; „laŭtumado" ktp. Aliflanke eble ne-eŭropano malfacile komprenas esprimojn kiel „prifajfa sinteno" aŭ ili rompis kun ŝi". Neologismoj, kiuj ne troviĝas en Plena Ilustrita Vortaro, tre maloftas, kvankam kelkaj vortoj ŝajnas al mi ne tute ĉiutagaj. Iom ĝenas konfuziĝo inter parki-parkigi, ŝajne-verŝajne kaj rozo-roso. Tamen, entute aĉetinda kaj leginda, eble eĉ literatur-epokfara verko.

FAZODIAGRAMOJ, Rob VETTER, Jaro ne-indikita, 42 paĝoj, 50 ilustraĵoj, fotokopiita en formato 15 x 21 cm. Sen ISBN. Prezo ne-indikita.

Verkoj pri fiziko bedaŭrinde maloftas en Esperanto, bonaj eĉ maloftegas. Jen unu el la maloftegaj. En la unua parto – fenomenologio – la aŭtoro traktas ekzemple la malleviĝon de la frostopunkto, la levumil-regulon kaj la teknikajn aplikojn de la fazodiagramoj. Temo de la dua parto estas la teorio: entropio, disiĝo-sumregulo, solida solvaĵo k.a.

La libreto estas bone legebla, se oni havas bazajn konojn de fiziko. Ĉar la aŭtoro kiel eble plej evitis fakesprimojn oni ne bezonas specialan fizikan fakvortaron. Rekomendinda verko, espereble ne la lasta tia!

Walter KLAG

EKZAMEN-SESIOJ: Sesio estas anoncita en la Jugoslavia kongreso, okazonta en Subotica de la 24a ĝis la 29a de septembro 1991. La Alp-adria renkontiĝo estas translokita al Pécs (Hungario) en oktobro, eventuale la antaŭvidita ekzamensesio povos translokiĝi ankaŭ. Firma dato ne estas fiksita por la sesio en Szombathely, unuavice por Aŭstroj kaj Hungaroj, eble oktobre. Sesion la belga sekcio organizos septembre. ZEL en Zagrebo decembre.

PASPORTA SERVO: TEJO anoncas la aperon de freŝa libreto de ĝia popularo kaj utila gastiga servo, post dujara paŭzo. Mendu ĝin de la Libroservo de UEA: 15 guldenoj.


INSTRUADO EN VJETNAMIO: La revuo 'Vjetnamio' raportis pri lastatempaj sukcesoj, ni resumos la artikolon en la sekva numero de IPR.

Ni esploru la mondon!

La produktiva Esperanto-grupo en San Diego, Kalifornio denove regalas nin per eldonaĵo verkita de infanoj mem. Nova 24-paĝa libreto 'Ni esploru la mondon' prezentas la rezulton de korespondado inter ok klasoj en tre disaj landoj: Britio, Francio, Pollando, Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Litovio, Ĉinio kaj Usono. Unue ĝi prezentas la flagojn de la landoj. Poste ĝi starigas dekon da demandoj pri ĉiu lando kaj prezentas mapon. Sur la najbara paĝo troviĝas la respondoj kune kun infan-desegnaĵo. En la mezaj pagoj troviĝas mond-mapo kaj mapo de Eŭropo, kiu ege utilas kaj por kreskigo de la geografiaj konoj, ankaŭ por dialogado en Esperanto, ekz. "Ĉu Mongolio estas sude de Ĉinio?" "Kompreneble, ne! Ĝi estas norde de Ĉinio." ktp. Fine de la libreto troviĝas praktika vortlisto kaj instrukcioj por divenludo: "Mi pensas pri loko sur la planedo Tero." en kiu la divenantoj rajtas uzi nur Ĉu-demandojn.

Ĉi tiu libreto valoras plurkampe, unue ĝi rekte prezentas la laboron de la infanoj, due ĝi montras la praktikan utilon de Esperanto por la starigo de internaciaj kontaktoj, trie ĝi bonigas la uzon de Esperanto eĉ en komencanta stadio, kvare ĝi uzas la lingvon por instrui geografiajn konojn kaj larĝigas la konon pri la vivoj de infanoj en foraj lokoj.

La titol-paĝo proklamas tion 'Libreto unu', do ni supozas, ke povos sekvi pliaj kajeroj. Tio dependos je la korespondemo de lernantoj en aliaj landoj. Por partopreni aŭ por akiri ekzempleron de ĉi tiu valora libreto (kiun vi rajtas fotokopie distribui al klasanoj), skribu al: 'Infanoj ĉirkaŭ la mondo', 3876 Belmont Ave, CA 92116 San Diego, Kalifornio, Usono.



Recenzetoj

TIU TOSKANA SEPTEMBRO de Corrado TAVANTI kaj István ERTL, Hungara Esperanto-Asocio, 137 paĝoj, 1a eldono 1990, formato A/5, ISBN 963 571 128 X.

En parko, kovrita de foliamaso, oni trovas la kadavron de bela knabino. Post longa enketado oni trovas la murdinton. La legado de ĉi-tiu krimromano estas ĝuo pro enhavo kaj stilo. La parte detala priskribo de „flankaj aferoj" vivigas personojn kaj situaciojn. Ofte oni renkontas nekutimajn, sed trafajn vortformojn: „elventrigi" (anstataŭ naski); la „ŝovoj kaj movoj" de taksio; „rigardi ĉue"; „laŭtumado" ktp. Aliflanke eble ne-eŭropano malfacile komprenas esprimojn kiel „prifajfa sinteno" aŭ ili rompis kun ŝi". Neologismoj, kiuj ne troviĝas en Plena Ilustrita Vortaro, tre maloftas, kvankam kelkaj vortoj ŝajnas al mi ne tute ĉiutagaj. Iom ĝenas konfuziĝo inter parki-parkigi, ŝajne-verŝajne kaj rozo-roso. Tamen, entute aĉetinda kaj leginda, eble eĉ literatur-epokfara verko.

FAZODIAGRAMOJ, Rob VETTER, Jaro ne-indikita, 42 paĝoj, 50 ilustraĵoj, fotokopiita en formato 15 x 21 cm. Sen ISBN. Prezo ne-indikita.

Verkoj pri fiziko bedaŭrinde maloftas en Esperanto, bonaj eĉ maloftegas. Jen unu el la maloftegaj. En la unua parto – fenomenologio – la aŭtoro traktas ekzemple la malleviĝon de la frostopunkto, la levumil-regulon kaj la teknikajn aplikojn de la fazodiagramoj. Temo de la dua parto estas la teorio: entropio, disiĝo-sumregulo, solida solvaĵo k.a.

La libreto estas bone legebla, se oni havas bazajn konojn de fiziko. Ĉar la aŭtoro kiel eble plej evitis fakesprimojn oni ne bezonas specialan fizikan fakvortaron. Rekomendinda verko, espereble ne la lasta tia!

Walter KLAG

EKZAMEN-SESIOJ: Sesio estas anoncita en la Jugoslavia kongreso, okazonta en Subotica de la 24a ĝis la 29a de septembro 1991. La Alp-adria renkontiĝo estas translokita al Pécs (Hungario) en oktobro, eventuale la antaŭvidita ekzamensesio povos translokiĝi ankaŭ. Firma dato ne estas fiksita por la sesio en Szombathely, unuavice por Aŭstroj kaj Hungaroj, eble oktobre. Sesion la belga sekcio organizos septembre. ZEL en Zagrebo decembre.

PASPORTA SERVO: TEJO anoncas la aperon de freŝa libreto de ĝia popularа kaj utila gastiga servo, post dujara paŭzo. Mendu ĝin de la Libroservo de UEA: 15 guldenoj.


INSTRUADO EN VJETNAMIO: La revuo 'Vjetnamio' raportis pri lastatempaj sukcesoj, ni resumos la artikolon en la sekva numero de IPR.

Ni esploru la mondon!

La produktiva Esperanto-grupo en San Diego, Kalifornio denove regalas nin per eldonaĵo verkita de infanoj mem. Nova 24-paĝa libreto 'Ni esploru la mondon' prezentas la rezulton de korespondado inter ok klasoj en tre disaj landoj: Britio, Francio, Pollando, Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Litovio, Ĉinio kaj Usono. Unue ĝi prezentas la flagojn de la landoj. Poste ĝi starigas dekon da demandoj pri ĉiu lando kaj prezentas mapon. Sur la najbara paĝo troviĝas la respondoj kune kun infan-desegnaĵo. En la mezaj pagoj troviĝas mond-mapo kaj mapo de Eŭropo, kiu ege utilas kaj por kreskigo de la geografiaj konoj, ankaŭ por dialogado en Esperanto, ekz. "Ĉu Mongolio estas sude de Ĉinio?" "Kompreneble, ne! Ĝi estas norde de Ĉinio." ktp. Fine de la libreto troviĝas praktika vortlisto kaj instrukcioj por divenludo: "Mi pensas pri loko sur la planedo Tero." en kiu la divenantoj rajtas uzi nur Ĉu-demandojn.

Ĉi tiu libreto valoras plurkampe, unue ĝi rekte prezentas la laboron de la infanoj, due ĝi montras la praktikan utilon de Esperanto por la starigo de internaciaj kontaktoj, trie ĝi bonigas la uzon de Esperanto eĉ en komencanta stadio, kvare ĝi uzas la lingvon por instrui geografiajn konojn kaj larĝigas la konon pri la vivoj de infanoj en foraj lokoj.

La titol-paĝo proklamas tion 'Libreto unu', do ni supozas, ke povos sekvi pliaj kajeroj. Tio dependos je la korespondemo de lernantoj en aliaj landoj. Por partopreni aŭ por akiri ekzempleron de ĉi tiu valora libreto (kiun vi rajtas fotokopie distribui al klasanoj), skribu al: 'Infanoj ĉirkaŭ la mondo', 3876 Belmont Ave, CA 92116 San Diego, Kalifornio, Usono.



KONFERENCA TEMO: Tireso, Raŭmo kaj nun...?

Manifesto sub lupeo

En la pasinta numero (p.23) ni kritike ekzamenis la dek-jaran Manifeston de Raŭmo kaj levis amason da demandoj. Multajn ni lasos neresponditaj ĝis la konferenco, sed mi volas nun tiri kelkajn el la plej interesaj kaj eternaj demandoj kaj proponi respondojn aŭ almenaŭ ideojn. La numerado sekvas tiun de la Manifesto (vd. IPR 91/1, p. 25)

1. Esperanto — dua lingvo por ĉiu: Jen slogano, kiun la manifesto volas ligi kun pracelismo. Kelkmomenta pensado iel pravigos ilian klopodon enterigi tiun kaj tiajn sloganojn. Ni denombru la antaŭkondiĉojn necesaj por plenumi ĝin, laŭ la tradicia interpreto, t.e. ĉiu homo sur la tero posedu du lingvojn, el kiu la dua estu Esperanto:

- Ĉiu homo sur la tero devus ricevi sufiĉon por manĝi
- Ĉiu homo sur la tero devus havas la bazajn loĝajn kaj sanservajn kondiĉojn
- Ĉiu homo sur la tero devus esti alfabetigita
- Ni devus trovi la rimedojn instrui duan lingvo al ĉiu sur la tero.
- Ni devus konvinki ĉiun sur la tero, ke Esperanto estas pli alloga kaj utila lingvo ol iu ajn alia, aŭ havi sufiĉan potencon devigi ilin akcepti tion!

Eĉ ne la kombinita politika, ekonomia kaj komunikada forto de Usono, Britio, Kanado, Aŭstralio kaj kompanio sukcesis en cent jaroj igi la anglan internacia lingvo por ĉiu, nek en la venontaj cent jaroj ili sukcesos. Same pri iu ajn nacia lingvo. Eĉ armita forto ne sukcesus tion atingi dum pli ol mallonga tempo. La angla konkeris eble 8% de la tergloba popolo (ja rimarkinda fenomeno!) sed ĝi akiris la facilan 8% — tiujn kun plej bona aliro al informoj, tiujn kun la necesaj konektoj, tiujn kun evoluinta mondo-kono, kun sufiĉa mono aŭ libera tempo investi. Konkeri la ceterajn 91% estus nepre pli malfacila tasko. Se tiom malfacilas al lingvo inunditaj je rimedoj, kun vasta populareco kaj laŭmodeco, kiom pli malfacilas por Esperanto, kies rimedoj estas ĉefe siaj internaj lingvaj avantaĝoj. Imagu, eĉ nur plenumi la unuan kondiĉon (manĝigi ĉiun) bezonus pli grandan fortostreĉon ol pretus (kaj eble eĉ kapablus) fari ĉiujn 'riĉajn' naciojn de la tero.

La slogano pli pozitive: Evidentas, ke klopodoj devigi la uzon de Esperanto desupre al nekonvinkita popolo fiaskos. La sperto pri la rusa en ĝiaj satelitaj landoj, aŭ pri la angla en Japanio ĝis la sesdekoj atestas tion. Ĉu sekve ni denuncu kaj forĵetu la sloganon? Eble ni povas reinterpreti ĝin pli pozitive; eble nia komunumo jam komprenas ĝin alimaniere sen eksplicite proklami tion.

Unue, ni devas malseverigi la pretendon 'dua'. Multaj homoj jam praktike bezonas du aŭ pli da naciaj lingvoj por vivi: tiuj en internaciaj familioj, en

landlimaj regionoj, aŭ kiel en Afriko, bezonanta triban aŭ vilaĝan lingvon, nacian lingvon kaj eventuale iun enportitan Eŭropan lingvon. Ni ne rajtas senigi ilin je tio.

Due ni detaligu la sencon de 'por'. La senco 'deviga por' estas klare kontraŭ la bazaj etikaj nocioj ligitaj kun Esperanto. Pli trafa interpreto de 'por' estas: 'je la dispono de'. Nome, Esperanto estu internacia lingvo je la dispono de ĉiu, kiu deziras uzi ĝin, ĉu kiel dua, ĉu kiel ajn-oma lingvo. Finfine, la homoj mem rajtas decidi en kiu ordo ili lernu siajn fremdajn lingvojn — tio estas baza homa rajto. Kio plej gravas, la homoj konsistigantaj tiun 'ĉiu' ne neglektu Esperanton en sia lingvo-elekto nur pro tio, ke ili ne estis adekvate informitaj pri ĝia ekzisto kaj utileco. Iuj 'pracelanoj' eble ŝokiĝus pri tia limigo de celo; unue, tiu limigo nek devas esti eterna nek malebligas aŭ malhepas pli amplekšan celaron, due, ĝi lasas ankoraŭ antaŭ ni multe pli da taskoj kaj defioj ol ni kapablas plenumi, nome:

- informi ĉiun kapabla entute lerni duan lingvon pri Esperanto
- disponigi al tiuj adekvatajn kaj modernajn lernilojn
- zorgi, ke efikaj kursoj ekzistu por ĉiuj dezirantoj, ĉie, por ĉiu aĝ-grupo kaj lern-kapablo, krome kategoriitaj laŭ celata uzado.
- Starigu rimedojn por instruista trejnado, bazitaj sur la plej provitaj kaj la plej freŝaj tendencoj kaj teknikoj de fremd-lingva instruado.
- Demonstri al ĉiuj lernantoj la eblecojn utiligi la lingvon sur plej diversaj kampoj.

Tio ja sufiĉas por okupi niajn estrarojn kaj komitatojn dum jarcento, sen la neceso esperi pri deviga enkonduko per dekretoj. Tio ne signifas, ke ni maldungu la desupristojn. Nia ĉefa lukto, paralele kun tiu ĵus detaligita, estas strebi, ke Esperanto ĝuu la saman rangon, rajtojn, rimedojn kaj prestiĝon kiel etna lingvo de simila disvastiĝinteco. Tio ne volas diri, ke Esperanto estas identa al etna lingvo, evidente ĝia rolo estas alia, sed estas tre grave, ke en edukado, en scienco, en la komerco, en ĉiuj internaciaj medioj, la publiko kaj la instancoj pretu akcepti, ke ĝi *estas* lingvo, kun rajtoj proporciaj al ĝia parolantaro kaj potencialo.

2. Ni kaj la angla. La esperantistoj jam komprenas kaj laŭte propagandas, ke Esperanto ne provas minaci naciajn lingvojn, kiam ili estas uzataj por ennaciaj celoj. La tuta etnisma tendenco ene de la movado, intime ligita kun Tiresismo, spegulas tion. Sed pli nuancite ni devas rilati al la uzo de nacia lingvo (supozeble forta) por internacia komunikado.

Unu-ekstreme, ni nek sukcesos malpermesi la uzon de lingvoj aliaj ol Esperanto tiucele, nek batali rekte kontraŭ tiuj lingvoj (en tio la Manifesto pravas); ali-ekstreme estus eraro neglekti kaj ignori la aktualajn naci-lingvajn kutimojn por realigi internacian komunikadon (kion la Manifesto malprave strebas). Ni certe havas taskon refuti la vaste kredatajn mitojn ĉirkaŭ la angla lingvo, kaj la

misperceptojn tenatajn eĉ de kleraj gvidantoj pri la lingva realeco en la mondo. ILEI devas aparte koncerni sin pri la lingvo-politiko aplikata en la fremdlingva instruado, ĉar tio ofte baziĝas ĝuste sur tiuj mitoj.

Ni ne rajtas deteni nin de batalo kontraŭ la '*La angla jam estas la mondlingvo*'-istoj, ĉar ili deskribas 80% de la monda loĝantaro, kio estas profunde maldemokrata ago. Ni havas gravan mision proponi Esperanton al tiuj deskribitoj; ni povas oferti al tiu malelito alternativan kaj alispecan vojon al la monda kulturo. Por fari tion, ne sufiĉas nur evoluigi tiun internan kulturon de Esperanto sed ankaŭ vidigi ĝin. Tion ni ne atingas adekvate nur per la desubismaj taktikoj postulataj de la Manifesto, necesas paralele iaj (ŝaĝe elektitaj) desuprismaj elpaŝoj, ĝis inkluzive tiaj kritikataj en la dokumento (ekz. agado ĉe UN.)

La Manifesto naivas asertante, ke la angla rolas nur kiel helplingvo, kiel la franca siatempe. Ĝi faras multe pli ol tio. Ĝi fariĝas sur gravegaj kampoj *la normo*. Mi citas ekzemplige el prospekto de la Teknika Universitato de Budapeŝto: 'Ni ofertas la plenan gamon de niaj kursoj ne nur hungare, sed ankaŭ en la angla, la internacia lingvo de scienco kaj esploro.'

Same pri internacia aviado, ŝiptrafiko, populara muziko ktp. ktp. Fake kaj loke, la grandlingvoj iĝas kulturaj buldozeroj, superantaj, transformiĝantaj, eĉ enterigantaj lokajn lingvojn kaj kulturojn. Sed tiom lertas la buldozistoj, ke la buldozatoj ĝenerale ne rimarkas la sekvojn de tiu procezo kaj volonte buldoziĝas.

En niaj klopodoj konigi Esperanton, ni ne ignoru la sukcesojn de la buldozeraj lingvoj, ĉar ili tre lerte avancas; tia modeco kaj populareco ne falis el blua ĉielo, ĝi estas zorge eĉ ruze direktata; ne ĉio el ilia agado estas aplikebla/inda al Esperanto, sed multo estas, kaj ni foje ŝajnas malkapablaj lerni eĉ bazajn lecionojn pri la evidente bezonataj taktikoj prezenti kaj instrui nian lingvon.

3. La kvar valoroj: La Manifesto elstarigas kvar ĉefajn pozitivajn valorojn de Esperanto, la unua el kiuj rilatas rekte al ĝia instruado, t.e. la propedeŭtika valoro de la lingvo. Tamen, tio estas nek ĝia sola, nek ĝia ĉefa eduka valoro. Esperanto ekzistas por esti pli ol pasiva ŝtupo-ŝtono por helpi homojn lerni aliajn lingvojn (precipe la buldozerajn) pli senpene. Pli granda valoro estas la fakto, ke ĝi konsciigas lernantojn pri la strukturo, mekanismoj kaj funkcioj de lingvoj entute, ĝi helpas ilin pli kritike alrigardi la propran denaskan lingvon, kaj rivelas al studentoj la eblecojn, limojn, bezonaĵojn, superfluaĵojn, problemojn kaj variojn de lingvoj kiel komunikiloj. La fakto, ke ĝi krome faciligas la lernadon de pliaj lingvoj estas kvazaŭ flank-efiko de tiu fenomeno. Ĝiaj eblecoj porti instuadon al internacieco devus esti same elstarigita super tiu propedeŭtika rolo.

La Manifesto samloke emfazas la novtipan internacian kulturon, kiu devas fonti el la komunumo. La aserto 'La kresko de niaj fortoj kaj aliĝo de novaj homoj estas nepre kondiĉitaj de la konsciigo pri tiuj ĉi valoroj' validas pri la

Esperanto-movado, sed ne nepre pri la komunumo. Iuj povus malkovri la utilecon de Esperanto en sia tereno, apliki ĝin lerte tie (pro faka klereco) kaj per tio ege kontribui al ĝia progreso, sen ke tiuj homoj sentu intime tiun apartenon al mem-elektita diaspora komunumo. Tiu sento por movadanoj tre gravas kaj stimulindas, sed ni ne insistu pri ĝi ĝis tiu grado, ke ni fortimigu potencialajn aplikistojn. Tio havas implicojn por la debato pri la 'fina venko'; vidu sube.

4. La kongresoj kiel vojo al kresko: Efektive kongresoj ludas gravan koherigan rolon por la komunumo kaj provizan vivigejon por la lingvo. Estas tamen tre duba aserto, ke ili provizas la ĉefan vojon al kresko. La lasta jardeko vidis la plej grandan UK kaj IJK iam ajn, kaj plurajn epokfarajn kongresojn en novaj mondpartoj (Brazilo, Ĉinio, Kanado, Kubo, Afriko) sed ni ne povas mezuri tre signifajn kreskojn de movadaj fortoj aŭ parolantoj pro tio.

Ni povas facile proponi aliajn apliko-kampojn, kiuj faros sam-valoran kontribuon al la progreso de la lingvo, kiom kongresoj. Ĝia uzo por publika klerigo kaj en la sciencoj altigus ĝian utilecon kaj proponus modestan sed realan alternativon al la angla hegemonio. En ĉiu komputila programo kiu funkcias kun diversaj lingvoj, indus ke Esperanto aperu kiel ofertata ebleco. Same en ĉiu instanca strukturo, kiu devas plurlingve funkcii – Esperanto trovu sian lokon kaj estu akceptata en la familio de lingvoj. Kampanjoj por unue permesi la oficialan instruadon de Esperanto kaj due por laŭorde ebligi la oficalan trejnadon de instruistoj en Esperanto estas ege bezonataj kaj povus fari pli grandan kontribuon al la progreso de la lingvo ol dekoj da miloj da flugfolioj kaj eĉ manpleno da kongresoj.

5. Kredoj: La manifesto asertas, ke la unua jarcento pruvis la taŭgecon de Esperanto esprimi ĉion. Tio estas troigo. Ĝi montris la lingvon mirinde esprim-pova kun vasta potencialo, sed ĝi ankaŭ vidigis embarase la post-reston de la terminologio sur plej diversaj kampoj, ne nur alt-sciencaj, sed eĉ ekzemple por la ĉiutaga hejma vivado. Ĉiu lingvo de limigita disvastigo frontas ĉi tiun urĝan neceson krei akcepteblajn kaj koherajn solvojn kaj ne simple subiĝi al la 'internacia' terminologia buldozero.

La Manifesto implicas, eĉ se ĝi ne celis tion, ke la unuaj cent jaroj nenion aŭ malmulton kreis 'kulture originalan kaj internacie valoran.' Prave, ke estonte la uzantoj de la lingvo devas strebi je tiu kreado, sed ili rekonu la trezoron jam ekzistantan kaj konstruu sur ĝin. Prave, oni emfazas la neceson je kvalito, sed necesas agnoski, ke ĝenerale kvalito kreskas el kvanto. Kvalilto bezonas la kvanton por vivi – ĝi bezonas ne nur kreantojn sed ankaŭ konsumantojn. La sperto de KCE, ĉiam strebanta al la kvalito, pravigas tiun neeskapeblan konstaton.

6. Finaj konstatoj: La Manifesto volis enterigi la finvenkistojn kaj la desupristojn, favore al interna kultura evoluo. Ŝajnas erare, nenecese kaj eĉ danĝere fari tiajn apartigojn kaj prijuĝojn. Finvenkistoj kaj kulturistoj ja kapablas trovi vastajn komunajn teritoriojn, kie agi, ilia laboro povas servi al ambaŭ celoj.

Unu ne devas malebligi la alian. La konstruo de fortika kulturo kaj parol-komunumo estas antaŭpaŝo valora, necesa, se ne sufiĉa, por iuspeca 'fina venko'.

La sola malutilo de naivaj finvenkistoj estas ke dissemo de malrealismaj imagoj kaj revoj povas kaŭzi seniluziigon kiam tiuj ne rapide realiĝas. Ni devas kompreni la realecojn de nia mondo kaj la loko de Esperanto en ĝi. Tion ni nek supertaksu, nek subtaksu – finfine Esperanto estas ankoraŭ en sia infanaĝo – en cento da jaroj kreksi de nulo ĝis ĝia nuna stato estas senprecedenca mirindaĵo. Se ni akceptas, ke estas preskaŭ miliono da parolantoj de Esperanto (ne tute malebla aserto), kaj ke estas trimil lingvoj en la mondo (ege minimuma takso), el kiuj nur ĉ. 150 estas parolataj de pli ol miliono, tio lokas Esperanton en la supera 3% de ĉiuj lingvoj – ĝi jam iĝis grandlingvo! – ĝi jam superis 97% el la lingvoj de la mondo.

Fine ni demandu, sub kiuj kondiĉoj Esperanto povus rapide prosperi (do se ne la klasika 'fina venko' almenaŭ iu signifa kvanto/kvalito-salto):

1) Ne nur pro la klopodoj de la esperantistoj. Ili ne havas la rimedojn, potencon, konektojn, influilojn tion sola atingi. Tia salto plej verŝajne rezultos el ekapliko de la lingvo flanke de ne-movadanoj, eble eĉ neparolantoj, kiuj ĝin povus uzi eĉ por celoj kaj en manieroj malagrablaj al la tradicia komunumo.

2) Ne sen la klopodoj de la esperantistoj. Ĝis tiuj potencialaj aplikistoj kun siaj lertoj kaj rimedoj malkovros nin, ni devas teni la lingvon evoluanta, la komunumon vivanta, la aplikeblojn vastiĝantaj. Kiu povas diri, kiom da potencialaj eksteraj aplikantoj ni jam maltrafis, pro informado neglektita, pro moderna lernolibro nehavebla, pro klubejo tro fermita, pro foresto el lingvobaroza konferenco. Rilate la grandan mondon, ni minimume praktikadu la politikon de 'ĉeesto' kaj 'niĉismo'. Kaj ni restu aktivaj eĉ se ni ĉesas esti la proprietetuloj de la lingvo. Se ne regi la uzon, ni almenaŭ influu ĝin.

Ni fortikigu nian komunumon kaj kulturon, sed ni ne ekskludu el niaj deziroj 'venkon' por Esperanto. Lastatempaj eventoj montras, ke en nia stranga mondo eĉ la neimagebla povas realiĝi. Se ni eliminas ian 'venkon' el niaj deziroj, ni riskas ne rimarki, se subite kaj neatendite kondiĉoj maturiĝus por atingebligi ĝin – tio verŝajne okazos en maniero kiun ni nun eĉ ne antaŭvidas.

Ni ne eliminu despurismajn kampanjojn, ĉar ili povas helpi nin konstrui la kvanton el kiu la kvalito povas naskiĝi. Sed ni elektu ilin zorge, ke ili ne vane kaj sen utila rezulto foruzu niajn limigitajn rimedojn. La desupraĵoj havu siajn analogajn desubismajn elementojn, tiel ke unu fortigu la alian. Nia nuna tasko estas plenumi la mankantajn aŭ malfortajn antaŭkondiĉiojn, por ke Esperanto efektive povu plenumi la rolon, kiun ni pretendas por ĝi.

Stefan MacGill,
junio 1991.

Noticoj el la granda mondo

Lecionoj sur magnetofona bendo

La eldonejo „Nauka" baldaŭ aperigos la libron de B. G. Kolker „Uĉebnik jazika Esperanto. Osnovoj kurs" (perfektigita varianto de la libro de la sama aŭtoro „Metodoĉeskije razrabotki..."). Oni povas ricevi magnetofonan registraĵon de ĝiaj tekstoj en modela prononcado (inter la parolantoj aŭdeblas ankaŭ la voĉo de la aŭtoro). Petu detalojn laŭ la adreso: 450000, u. Ufa-centr, p.k. 1046, Stepanov A.M.

El Informilo de Ukrainia Esperanto-Asocio

Nun en Ĉinio iuj universitatoj volas dungi instruistojn aglalingvajn el fremdaj landoj. Mi proponas, ke min inormu geesperantistoj, kiuj posedas la anglan lingvon, kaj ankaŭ instruus en ĉinaj universitatoj, plie helpus la lokan Esperanto-movadon. Mi povas doni pli detalajn informojn...

Wang Tianyi,
ĝenerala sekretario de Xian E-Asocio,
Xiyinglu 74Hao,CN–710054 Xian, Ĉinio

SENKOSTAJ ANONCETOJ POR KORESPONDEMULOJ!

Jenaj aŭstriaj gazetoj presas senkoste vian korespondpeton:

a) Kurier-Ombudsman, Seidengasse 11, A-1072 Wien;

b) Bazar, Postfach 1041, A-1041 Wien;

c) Fundgrube, Postfach 166, A-1121 Wien.

Necesas jenaj indikoj: Lando, nomo, (ina aŭ vira), adreso, aĝo, hobioj, korespondlingvo(j) – proponu Esperanton.

SUS 10

La deka Sanmarina Universitata Sesio okazos inter la 31.08.–09.09. 1991 en San Marino, en du sekcioj: *kibernetiko* OProf. Dr. habil. H. FRANK, (D): „Enkonduko en la kibernetikon per la ekzemplo de la lingvo-orientiga instruado"; Dr. habil. V.POLAK, (D): „Elektitiaj temoj el la kampo de artefarita inteligenteco" kaj *struktursciencoj:* Prof. C. MINNAJA dr., (I): „Apliko al la lingvosciencoj de la teorio de la katastrofoj"

Informoj kaj aliĝoj: AIS, Kleinbergerstr. 16, D-4790 Paderborn, Germanio. Pri la 11a sesio en Moskvo jarŝanĝe ni jam raportis detale en IPR 90/4.

MANUSKRIPTOJ POR IPR

Ni kompostas nian revuon IPR komputile pere de sistemoj Microstar (simila al Wordstar) kaj Ventura, sur maŝinoj IBM PC kun disketoj 5.25". Multaj legantoj havas similajn komputilojn. Kontribuaĵoj estas bonvenaj jam en diskeeta formo: Ventura kapablas akcepti dudekon de la plej popularaj tekst-prilaboraj sistemoj. Ni havas aliron al Optika Karaktro-Lega sistemo kiu povas legi Esperanton. Se vi sendos puran manuskripton sen manaj reviziaĵoj kun nigre tajpitaj literoj sur blanka papero ni povas enlegi tion en sekundoj.

Financa raporto 1990.

RIMEDOJ	SEK	KOSTOJ	SEK
Membrokotizoj	29.016:73	IPR	37.177:55
Libroj, filatelaĵoj	235:81	Bankkostoj	240:-
Fondaĵo Szerdahelyi	14.977:56	Afranko, telefono	2.848:18
Konferenco Kubo	8.822:18	Presaĵoj, fotokopioj	3.722:21
Eldonoj	4.518:90	Estraro	6.300:33
Ekzamensesioj	909:98	III:a Metodika kurso	548:10
Rentoj	8.150:58	Faka kotizo al UEA	768:54
Kompenso UEA	3.327:-	Konferenco, Norvegio	355:86
Kompenso Hodler	3.327:-	Azia agado	688:-
Donaco	1.663:50	Koleghelpa konto	100:-
		Al Fondaĵo Szerdahelyi	15.121:57
		Rezervo por eldono	4.957:37
			72.827:71
		Gajno 1990	2.121:53
	74.949:24		74.949:24

AKTIVO	1989-12-31	1990-12-31	
En kaso	1.639:85	209:41	
Banko SE	82.932:71	63.591:64	
Handels	775:20	0	
Frosta	9.309:54	2.398:95	
Poŝtĝiro	1.090:85	3.287:45	
UEA, ilek-a	10.027:84	39.706:01	(NLG 11.934:48
Librostoko	6.850:-	8.960:-	
Stoko de filatelaĵoj	500:-	480:-	
Kompenso de UEA	-	4.990:50	(NLG 1.500)
Nepagitaj fakturoj	304:-	200:-	
Ce GCA	-	4.950:58	
	113.429:99	128.774:54	

PASIVO		
Koleghelpa konto	805:-	705:-
Fondaĵo Szerdahelyi	224:01	15.441:37
Rezervo por eldono	-	4.957:37
Suldo al komisiitoj	-	1.920:-
Ce KCE por ekzam.	278:15	-
Propra kapitalo	112.122:83	105.750:80
	113.429:99	128.774:54

SEK=svedaj kronoj NLG=nederlandaj guldenoj

1990-12-31

Bertil Andreasson

Bertil Andreasson
kasisto ILEI

Fondaĵo Szerdahelyi

Donacoj 1989	224:01	
Donacoj 1990	14.977:56	15.201:57
Bankkostoj 1990	- 80:-	15.121:57
Al speciala bankkonto		15.121:57
Rento 1990		319:80
Saldo 1990-12-31		15.441:37

Koleghelpa kaso

Saldo 1989-12-31	805:-	
Donacoj 1990	660:-	1.465:-
19 membrokotizoj 1990	- 760:-	- 760:-
Saldo 1990-12-31		705:-

Detaloj (Ciuj sumoj en svedaj kronoj)

IPR

Rubriko	3/89	4/89	1/90	2/90	3/90	Entute
Presado	4.022:97	4.041:73	4.067:50	4.133:73	4.218:36	20.484:29
Ekspedoj	619:57	622:46	617:63	654:14	664:66	3.178:46
Afranko	1.802:53	1.807:61	1.887:02	1.427:56	2.229:62	9.154:34
Kompostado: GCA				178:81	181:65	360:46
HEA	800:-	800:-	800:-	800:-	800:-	4.000:-
Sumo	7.245:07	7.271:80	7.372:15	7.194:24	8.094:29	37.177:55

Ekzamensesioj

Nomo	Enspezoj	Elspezoj	Por ILEI
Vierhouten, NL	-	-	-
Kungälv, S	600:-	230:-	370:-
San Francisco, USA	791:70	182:70	609:-
Havano, UK	621:18	-	621:18
Hanabanilla	275:80	-	275:80
Roterdamo	-	-	-
Anoncserio	-	966:-	- 966:-
Sumo	2.288:68	1.378:70	909:98

Krom la sesioj estis kostoj de testoverkado,presaĵoj, kopioj,afranko kaj telefono,

Eldonoj

Nomo	Enspezoj	Elspezoj	Rezulto	Subvencio	Valoro de la stoko *
Szanser-materialo				4.957:37	432:-
Symoens: La valoro....					
franca	1.575:82		1.575:82		3.039:62
angla	1.904:31	5.828:64	-3.924:33		4.312:-
Ekzamena gvidilo	2.236:54	326:50	1.910:04		1.180:80
	5.516:67	6.155:14	- 438:47	4.957:37	8.964:42

* Jara deskribo: 10%

4.518:90

Evoluo de la membraro de ILEI

	1984	1985	1986	1987	1988	1989	1990
Argentino	-	-	1	1	5	7	-
Aŭstralio	-	6	-	4	4	-	1
Aŭstrio	20	18	19	19	11	15	19
Bangladeso	-	-	-	1	-	-	1
Belgio	21	21	23	21	17	31	15
Brazilo	6	7	11	25	28	28	42
Britio	-	1	6	11	13	16	15
Bulgario	4	1	1	1	1	30	30
Centrafrika resp.	-	-	-	-	1	-	1
Ĉeĥio	-	-	-	-	-	5	*16
Ĉinio	-	5	5	7	9	7	38
Danlando	10	11	-	-	-	-	-
Estonio	-	-	-	-	-	5	35
Finnlando	30	30	30	30	31	37	36
Francio	30	26	23	42	25	33	18
Germanio FR	65	61	59	65	69	66	76
Germanio GDR	-	1	-	-	2	7	6
Grekio	-	5	-	-	-	-	-
Hindio	-	-	-	-	1	-	2
Hispanio	45	23	22	25	23	22	22
Hungario	3	10	47	31	42	40	53
Irano	-	-	-	-	-	-	3
Israelo	8	9	6	-	7	1	10
Italio	164	118	110	110	101	71	81
Japanio	-	-	-	5	6	7	2
Jugoslavio	15	1	22	10	1	6	6
Koreio	-	-	-	5	-	6	6
Kostariko	-	-	-	-	-	1	-
Kubo	-	-	-	-	-	5	5
Luksemburgo	1	-	-	-	-	-	1
Malto	-	1	1	-	-	-	-
Meksikio	-	-	-	-	-	-	1
Nederlando	46	42	44	59	61	58	60
Nigerio	-	-	-	3	-	-	-
Norvegio	-	4	7	13	13	15	19
Nov-Zelando	-	-	-	-	-	-	1
Pollando	3	7	7	6	4	4	3
Portugalio	1	1	1	2	-	-	-
Ruando	-	-	-	-	1	-	1
San Marino	5	5	5	5	5	5	5
Slovakio	-	-	-	-	7	42	*16
Sovetunio	1	1	1	1	2	5	9
Sudafriko	-	8	-	10	10	-	-
Svedio	49	50	58	55	60	59	53
Svislando	-	1	12	13	17	13	17
Tanzanio	-	-	-	-	1	-	1
Usono	80	69	81	80	90	88	85
Venezuelo	-	-	-	7	7	3	4
Vjetnamio	-	-	-	-	-	-	1
Zairio	-	-	-	-	-	5	5
	607	**543**	**602**	**667**	**675**	**743**	**808**

* = transpago ne solvita. En 1990 la koleghelpa kaso prizorgis 19 membrigojn.

Por pli fruaj jaroj la suma membronombro estis:

1981: 576
1982: 534
1983: 650

1991-02-20
Bertil Andreasson

LINGVOPOLITIKO:

Plurlingvismo kaj najbara dulingvismo kiel idealo kaj realo

Du artikolojn elektis, kaj el la hungara esperantigis BARCSAY Zsuzsa.

Eŭropo: defio de lingvoj

La eksterordinara defio, kiun Eŭropo direktis al si mem por 1993 estigis senton similan al febro. Surkampe de la lingvoj ĉiuj estas maltrankvilaj: registaroj, entreprenoj, familioj kaj studentoj. La dokumento pri unueco de Eŭropo kaj la perspektivo pri libera trafiko de varoj kaj personoj instigas ĉiun: oni preparu sin por ĉi tiu nekutima situacio.

Kiel ni plenumu tion? Kiel ni komunikadu, komercu en tiu nova plurlingva medio, kiu konsistas el naŭ oficiale samrajtaj lingvoj, sed kies ŝancoj evidente ne estas egalaj?

Se mi komparas la lernejan klerigo-sistemon de la 12 landoj de la Eŭropa Komunumo (EK), ni konstatas, ke en la duono de la 12 landoj estas devige lerni unu fremdan lingvon, plej ofte la anglan (escepte de Britujo kaj Irlando). La fasko de lernataj lingvoj estas limigita. Nuntempe kvar lingvoj superregas: la angla, la franca, la hispana kaj la germana. La lingvojn de la aliaj EK-landoj oni malofte ofertas kaj malpli elektas. Instruado de fremdaj lingvoj okazas precipe en la mezgradaj (duaŝtupaj) lernejoj.

Kiel oni povas rezisti antaŭ la angla-amerika 'rul-bloko', kies hegemonio surkampe de la teĥniko, negoco kaj aŭdvidaj rimedoj estas tiom forta, ke la nekono de tiu lingvo estas perceptata kiel signo de analfabetismo. Kelkaj ne hezitas rekomendi, ke la angla estu akceptata kiel lingvo de Eŭropo.

Se Eŭropo ne volas perdi sian animon, malriĉigi sian kulturon, forgesi la historion, se ĝi volas aperi kiel nova potenco en la dudekunua jarcento, ĝi devas akcepti la plurlingvecon. Kiel skribis ĉi-gazete Maurice Allais en cetere dusenca artikolo: — "Ni, eŭropanoj, ĉiuj bezonas plurajn, sed minimume tri lingvojn."

Mi batalas kontraŭ neniu lingvo. nek kontraŭ la angla. Mi simple defendas la francan lingvon. La germanoj devas defendi la germanan, la italoj la italan, la hispanoj la hispanan.

Pli kaj pli oni timas, ke la akcelo de la eŭropa konstrukcio kondukas al perdo de identec-konscio ĉe la aliĝantaj nacioj. Al tio povas korespondi nur reciproka protekto de la lingvoj de Eŭropo. Ties ŝlosilo estas la sekva necesa kaj sufiĉa kondiĉo: ĉiu civitano de la Eŭropa Komunumo alproprigu du vivajn fremdajn lingvojn. Tion rekomendas Francujo. Mi asertas, ke la protekto de la franca lingvo en Eŭropo estas realigebla pere de la protekto de la lingvoj de niaj partneroj. La franca lingvo nur tiomgrade konservos sian pozicion sur nia kontinento, kiomgrade ankaŭ la aliaj lingvoj konservos siajn poziciojn.

Ĉeli, ke ĉiu eŭropa infano lernu almenaŭ du lingvojn krom la gepatra, ĉu estas nereale? Tute male, se ni decidas, ke jam en la elementa lernejo ni komencos la instruadon de la unua lingvo. Kiam ili transiras al la duagrada lernejo ili jam kapablas lerni duan fremdan lingvon. Des pli facile, ĉar ili jam en frua infanaĝo malkovras la meĥanismon de la lernado. Pedagogoj diros — se ili konsentos pri tio! — en kiu aĝo estas inde enkonduki la infanojn en la lernadon de la unua fremda lingvo; sed la gepatroj bone scias, ke ju pli frue, des pli bone. Tiel ĉiu eŭropano lernus komuniki en tri lingvoj, el inter kiuj unu laŭeble apartenu al alia lingvogrupo ol la gepatra lingvo.

Tiu ĉi propono ne intencas eviti la anglan lingvon. Ni ne faru kiel struto, sed vidu, ke la angla lingvo okupis tiun lokon en la mondo, kiun bravaj homoj sonĝis por Esperanto. Tre verŝajne, ke multaj gepatroj inklinas elekti la lingvon de Shakespeare kaj Hemmingway kiel unu el la du lingvoj. Ĉu pro tio ni plendu? Kompreneble ni supozu, ke la apliko de la angla lingvo ne okupos la lokon de aliaj lingvoj. Ĉar tion Eŭropo ne povus toleri!

Por ke neniu lingvo havu privilegion, estus dezirinde, ke la dekduopo akceptu la najbarecan dulingvismon, kiu apogus la instruadon ekz-e de la hispana aŭ portugala en la sudokcidenta, la itala en la sudorienta kaj de la germana en orienta Francujo. Ni ne havu iluziojn, ĉar la plulingveco baziĝas sur malegala situacio: kvankam ĉiu lingvo rajte povas postuli al si egalan kaj elstaran dignon, kaj kvankam ili estu konsideretaj kiel elementoj de la ĝenerala heredaĵo de la homaro, ni devas konstati, ke ne ĉiuj lingvoj havas similan situacion eĉ en tiuj landoj, kies identecon ili esprimas, des malpli ekster la landlimoj.

Do, la lernejoj havas gravan rolon: ili devas instrui ne nur la ekonomian, sed ankaŭ la socialan kaj kulturan variecon kaj riĉecon de tiuj regionoj. Ankaŭ la amaskomunikiloj devas transpreni tiun taskon.

Hungarlingva revuo Valóság, n-ro 4/1990 (p.121-123) transprenis la artikolon de Alain Decaux el la franca gazeto 'Le monde', 1989-09-14.

Fremdlingva lernado en Aŭstrio

En la kuranta lernojaro en la Aŭstriaj gimnazioj inter la elekteblaj studobjektoj la plej popularaj estas la lingvoj (eĉ pli ol la indormadikaj studobjektoj). La ekspertojn surprizis, ke inter la elekteblaj fremdaj lingvoj la itala okupas la unuan lokon, nur post ĝi sekvas la angla kahj la franca. La latina allogis nur malmultajn lernantojn, sed kreskis la intereso pri la hispana kaj la rusa.

La nombro de tiuj lernejoj, en kiuj la rusa estas instruata, altiĝis de la pasintjara 73 je 138, tiel ĉi-jare 3747 lernantoj okupiĝas devige aŭ fakultative pri la rusa lingvo, tio estas 691 pli ol pasint-jare.

Simile kreskis la intereso pri aliaj slavaj lingvoj kaj pri la hungara. En Burgenlando la serbokroata estas deviga por 169 lernantoj kaj fakultativa por 84. Ankaŭ en aliaj regionoj oni lernas la serbokroatan.

En la unuaj kvar jaroj de la Pannonia Gimnazio en Oberpullendorf, 46 geknaboj lernas la hungaran, en la Komerca Akademio de Felbach kaj la gimnazio de Obershutzen la hungara estas la deviga fremda lingvo. Plurloke oni instruas la ĉeĥan kaj la slovakan.

Laŭ ibf-spektrum el Élet és Tudomány, n-ro 19/1991, p. 603.

Redaktofino de IPR91/2:28a junio 91 smg.

Postskribo post-lastsekunda: La presejo konfirmas liveron lunde de la unua kajero de la lernolibro eldonata de ILEI por 10- ĝis 14-jaruloj, 'Tendaraj tagoj'. Do, ĝi certe haveblos en la kongresoj. 44 grandformataj paĝoj, abunde ilustrita, 12 gld.

HONORAJ MEMBROJ

Peter Zlatnar (YU, 1984) – Mario Dazzini (I, 1985) – Erbetta Marcel (CH, 1986)
Irja Klemola (SF, 1986) – Olle Olsson (S, 1986) – Jozef Toczyński (PL, 1986)
Helmut Sonnabend (D, 1987) – Catina Dazzini (I, 1988) – Szerdahelyi István (H, 1988)
M.H. Saheb-Zamani (IR, 1989)

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Argentino	: Herminia Kirkerup de Fernandez (s-ino), Calle Cerrito 1.249, Barrio San Martín, RA-5000 Córdoba, (Córdoba)
Aŭstrio	: Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
Belgio	: Alex Humet, Van Campenhoutstr. 4, B-2600 Berchem
Brazilo	: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 São Paulo SP
Britio	: Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 82D
Bulgario	: Ivanka Spasova, j.k. Lenin bl. 20, vh. 3, BG-1124 Sofia
Ĉeĥio	: Vêra Barandovska, Volgogradská 41, CS-70400 Ostrava 3
Ĉinio	: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normal University, 430070 Wuhan, PR China
Estonio	: Eve Otsa, Liivalaia 30-12, EST-200001 Tallinn, Estonio
Finnlando	: Synnöve Mynttinen, Keskussairaalankatu 5 M 133, SF-15850 Lahti
Francio	: Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim
F.R. Germanio	: Stefanie Tucker, Alatseestr. 14, D-W-8900 Augsburg
	: Till-Dietrich Dahlenburg, Feldstr. 13, D-O-2722 Brüel
Hispanio	: Manuel López Hernández, Poŝtkesto 832, E-41080 Sevilla
Hungario:	: Márta Kovács, Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest
Israelo	: Murĵan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
Italio	: Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa
Japanio	: Toi Kunio, 1448-1 Simotakajyanagi, Kazo-si, Saitama 347
Jugoslavio	: Sonja Tavčar, Liminijanska 6, YU-66320 Porotorož
Korea Resp.	: Gilsu So, Sodaemun, P.K. 59, Seoul-120
Nederlando	: D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe
Nordameriko	: Doroteo Holland-Kaupp, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono
Norvegio	: *Vakas*
Pollando	: *Vakas*
Portugalio	: Alexandre Kasesa, Rua Actriz Palmira Bastos 10, 4'B, P-1900 Lisboa
Sanmarino	: Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, I-43031 San Marino
Slovakio	: Anton Zachariáš, Sobotské námestie 6, CS-05801 Poprad
Sud-Afriko	: Japie Spoelstra, Posbus 20185, Noordbrug 2522, Suid-Afrika
Svedio	: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby
Svislando	: Nicole Margot, Tour Grise 28, CH-1007 Lausanne
Venezuelo	: Inĝ. Felix Garcia Blasquez, Apartado 75.090, YV-1070 A Caracas
Zairio	: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre)

REPREZENTANTOJ

Bangladeŝo : Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000
Centrafrika Resp. : Luc Feidangai, B.P.960, Bangui
Ĉilio : Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago
Hindio : Abani Halter, Jamboni, P.O.Bolpur 731204, W. Bengal
Irano : Mohammad Karamudini, P.O.Box 13445-747, Tehran/Iran
Niĝerio : Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Ekpoma Bendel
Tanzanio : Mramba Simba, S.L.P. 1051, Bunda Mara

LABORKOMISIONOJ

Statistiko : Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, B-8400 Oostende Tel. (059) 70.87.00

Didaktikaj lud(il)oj : Georges Sossois, rue du Basson 79, B-6001 Marcinelle Tel. (071) 43.62.05

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO : (Rilatoj de reciproka informado, Kategorio C)
: 7 Place Fontenoy, F-75007 Paris.
Reprezentantoj de ILEI:
François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, F-75010 Paris

UEA : Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

IEI : Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag

KCE : Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

Kontribuaĵoj al IPR

tajpitaj nete per nigra rubando sur blanka papero kun adekvataj marĝenoj, aŭ komputile sur 5.25 colaj disketoj per IBM-PC-kongrua sis temo kaj konata tekst-prilaborilo, al la adreso de la Redaktejo (vd. kovrilpaĝon)

Abonado al IPR kaj membriĝo al ILEI:

(membrokotizo 50 Svedaj Kronoj)

1) poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). «La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj» (ILEI). Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby (Svedio).
2) poŝtĝirkonto: 3789 64 de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando), por la interna konto ILEK-A de ILEI.